

ISSN 1846-5021

**GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ**

# Zagreba Esperantisto

සංස්කෘත  
ප්‍රකාශනපාලන

**Ĉi-numere legu pri:  
LA SOLENAĴO EN "LISINSKI" SUB LUPEO  
HISTORIA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ  
ĴURNALISTOJ EN LITOVIO  
DETLEV BLANKE PRELEGIS EN KROATIO  
NOSTALGIA TRAJNO "ZAMENHOF"  
IFEF-KONGRESO EN POZNANO  
KROATAJ RADIKOJ DE BRAZILAJ  
ESPERANTISTINOJ**

**3**

**2008**

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
[josip.pleadin@gmail.com](mailto:josip.pleadin@gmail.com)

## Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
[radenko.milosevic@zg.htnet.hr](mailto:radenko.milosevic@zg.htnet.hr)

## Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
[grafokom@kc.htnet.hr](mailto:grafokom@kc.htnet.hr)  
[zagreba.esperantisto@gmail.com](mailto:zagreba.esperantisto@gmail.com)

## Redakcianoj:

Marica Brletić, Snježana  
Habulin, Vida Jerman, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

## Presis:

Grafokom, Đurđevac

## Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro,  
marto, majo, julio, septembro  
kaj novembro). En 2008 aperos  
ses numeroj.

## Jarabono por 2008:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj  
al ĝirkonto de "Grafokom"  
2360000-1100925404  
alilande: 15,00 eŭroj  
al UEA-konto: plea-k

## Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg  
176, NL-3015 BJ Rotterdam  
[libroservo@co.uea.org](mailto:libroservo@co.uea.org)

Orbis Pictus, Via Parini 5  
IT-34129 Trieste  
[orbispictus@iol.it](mailto:orbispictus@iol.it)

## RESUMO

Majo alportis tre multajn eventojn. Ŝajnas, ke nia 32-paĝa kajero ne povas nombri ĉiujn, do ni elektis la plej gravajn lande kaj internacie. Kiel enlande la plej gravan eventon ni elstarigas la Centjarigan koncerton okazintan la 26-an de majo en la Koncertejo "Vatroslav Lisinski" en Zagrebo, kiun vizitis - 1.500 spektantoj. Svarmis opinioj, kiujn nur parte vi trovos sur niaj paĝoj. Ankaŭ la vizito kaj prelegoj de d-ro Detlev Blanke, kiu honorigis Zagrebon per sia alveno, altiris nemalgrandan atenton de lingvistaj fakuloj kaj de esperantistoj mem. El aliaj gravaj eventoj ni menci la tradician aranĝon Pokalo Kostreno 2008, kiu sukcese okazis ankaŭ ĉi-jare. Ni raportas ankaŭ pri la jarkunvenoj de la plej granda zagreba societo "Bude Borjan" kaj de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio. Laste, sed ne malgrave, ni mencias ankaŭ la tre sukcesan filatelan ekspozicion en la konstruaĵo de Muzeo "Mimara", kiu estas ankaŭ parto de centjarigaj eventoj.

Internacie la plej grava evento certe estis Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj-Esperantistoj, okazinta en la ĉefurbo de Litovio. Tiun aranĝon, perfekte organizitan de litoviaj esperantistoj, partoprenis aktive ankaŭ tri kroataj reprezentantoj. Ampleksan raporton vi trovos ĉi-numere, al kio aldoniĝas intervjuo kun ĝia ĉefa organizanto Povilas Jegorovas, kaj opinio de la reĝisoro de la kongresa temo Humphrey Tonkin.

Internaciskale, kroataj esperantistoj estis aktivaj diversloke, kaj en la kongreso de SAT-amikaro en Antony, kaj en la kongreso de IFEF en Poznano, kaj en la unua Serbia Esperanto-Kongreso en Niš. La partoprenintoj dividas kun ni siajn impresojn kaj raportojn.

Pollando, kiu preparas sin por la UK sekvontjare en Bjalistoko, ĉi-numere ricevis sufiĉe da spaco. Jen ni prezentas artikolon pri nostalgia Trajno "Zamenhof", kiun peris al ni Ela Karczewska, dum pri la ĉirkaŭmonda vojaĝo de Esperantotur raportas Andrzej Grzebowski.

Kvankam neesperantaj temoj malmultas ĉi-foje, interesa estas mencio pri Ivan Vučetić, aŭtoro de daktiloskopio, kaj teksto el Brazilo, kiu mencias temon de multaj kaj doloraj elmigradoj de kroatoj tra la pasintaj 150 jaroj. En Brazilo ni trovis du freŝajn esperantistinojn, kiuj rememoras pri siaj kroataj radikoj.

Kvankam signita kiel "maja" numero, pro multaj eventoj ĉi tiu kajero aperas fakte en junio. La sekvan vi atendu meze de varma somero - en julio.

**La redakcio**

# LA SOLENAĴO EN “LISINSKI” SUB LUPEO

✍ Josip Pleadin

Antaŭ ol prijuĝi la objektecon de la verkinto de ĉi tiu artikolo, konsideru, ke ĉiu pritakso devas havi individuan noton. La verkinto de ĉi tiu artikolo ne deziras al vi trudi la propran percepton de la evento en la Koncertejo "Lisinski", okazinta la 26-an de majo (20h00) kiel ĝenerale akcepteblan, ĉar ĝi ja ne povas esti tia, se por nenio alia, almenaŭ pro la fakto, ke la verkinto de la artikolo "partoprenis" la solenan programon nur virtuale, spektinte la aranĝon sur sia ekrano post ĝia okazigo, do li havis eblecon percepti ĝin alimaniere ol la ĉeestintoj. La filmita materialo (danke disponigita de Krunoslav Tišljar el Zagrebo, profesia kameraisto), estis nemuntita, do la afero estis prezentita tia kia ĝi estis efektive, kvankam pro la direktiĝo de la kamera fokuso al la scenejo, ne eblis vidi ĉion alian. Ekzemple, en la filmita materialo mankis parto de la historia prezento sur lumpanelo, aŭ reagoj de la publiko (kiu estis nur aŭdebla). Ĉiukaze, la artikolverkinto decidis mem akiri propran opinion, ĉar la reagoj venintaj en la redakcion de "Zagreba Esperantisto" estis multaj kaj ekstreme diferencaj.

La ebleco organizi solenan koncerton en la prestiĝa zagreba koncertejo estis lanĉita tre entuziasme, kvankam la spertoj el aliaj landoj avertis, ke ni povas havi sufiĉe da mono por tion fari, kaj sufiĉe da forto por organizi, kaj tute bonajn teknikajn kondiĉojn - sed kio pri la publiko? Pri tia debaklo (ĉu tro forta vorto?) skribis nia finna kunlaborantino, kiu atentigis, ke "Arta Lumo", ankaŭ ambicie anoncita programo de la finna centjariga jubileo, havis ĉion krom publikon.

Kiel montriĝis en la kroatia kazo, publiko ne mankis. Laŭ la oficiala informo de la organizanto, alvenis ĉirkaŭ 1.500 spektantoj. Tio eblis ĉar la enirbiletoj estis senpage, kaj ĉar la grandajn kostojn (preskaŭ 7.500 eŭroj) por luo de la koncertejo pagis la Urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto, dum la artistoj prezentis senpage. La distribuado de la enirbiletoj ankaŭ estis organizita efike. Ĉiu povis preni certan kvanton da biletoj por siaj amikoj, konatoj kaj parencoj, klasestrinoj prenadis biletojn por tutaj klasoj ktp. Ŝajnas, ke en tia biletdistribuado, grave rolis ankaŭ esperantistoj, kiuj venis eĉ el tre malproksimaj lokoj, kvankam la aranĝo okazis labortage. Tamen, el iliaj reagoj sekvas, ke ili atendis ion tute alian.

Gravas starigi la demandon, al kiu estis destinita la koncerto? Ĉu al neesperantistoj por konatigi ilin pri la fenomeno kaj granda jubileo de Esperanto, aŭ por esperantistoj mem, aŭ por ambaŭ? Se por esperantistoj, tiam la afero estas komplete maltrafa, ĉar Esperanto aŭdeblis tre malofte, kaj nur kelkajn programerojn ion devas akcenti kiel

unike valorajn kontribuojn al Esperanta kulturo. Se la programo estis destinita al neesperantistoj, ankaŭ tiam okazis maltrafo, ĉar el la duonprofesia aŭ amatora programo la publiko ne ricevis la plej gravajn informojn, kaj ĉiukaze imagis la movadon por-esperantan iaspeca amatoreca organizaĵo, kiu post cent jaroj da ekzistado tamen devus doni ion pli konkretan, ion pli specifan kaj ion pli altnivelan. Tio eble eĉ klarigas la nesufiĉan reehon de la programo en informmedioj.

La unua afero kiu malbone impresis estis la teksto verkita kiel scenaro de la koncerto, kiu gvidas tra la historio, kaj kiu akompanis la projekciatajn fotojn. La unua kaj la plej grava malĝustajo de tiu teksto estas la aserto, **ke nia organizaĵo ekzistas 100 jarojn seninterrompe**. Eĉ la movado mem ne ekzistis seninterrompe 100 jarojn, des malpli la organizaĵo! La teksto estas multloke kripla kaj tute ne prezentas kompletan historian bildon de nia movado en Kroatio. Ĝi pli multe prezentas la medion (la urbon) ol la Esperantajn eventojn. Kaj ĝi, laŭdire, estas kreita surbaze de la arkivo de KEL. Montriĝas do, ke la arkivo de KEL estas tre mizera, ĉar oni memoras nur la plej freŝajn eventojn (SEK, IKS), kaj forgesas multajn aliajn pli gravajn. La teksto akcentas gravecon de Paul Kastner, Antonija Jozičić, Danica Bedeković, Hohlov, Sekelj ... El tiu teksto tute ne rekonblas ekz. Maruzzi, Laborista Esperanto-societo, societoj kaj unuopuloj el aliaj urboj, gravaj naciaj kongresoj ktp. Al neinformita aŭskultanto ŝajnas, ke la plej grandan akcenton al kroatia movado donis Tibor Sekelj, kiu jes estis influa, ĉar liajn ideojn lanĉitajn de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto poste transprenis SEK kaj IKS, kiuj en la krizaj 1970-aj jaroj savis la movadon kaj grave progresigis ĝin, kaj faris el ĝi socie honoratan eron, sed ja la rolo de Tibor estis multe pli malgranda ol tion mencias la teksto. Ŝajnas, ke la meritoj en tiu teksto estas elstarigitaj arbitre kaj laŭ propra gusto de la verkinto, kio ne rajtis okazi en tiel grava momento, ĉar tio lasas falsan impreson pri Esperanto kaj ĝia movado ĉe neinformitaj aŭskultantoj.

Esperantistoj plej ofte rigardas la aferojn tra "verdaj okulvitroj", kredante, ke sammaniere pri ni pensas ankaŭ la ekstera publiko. Tiujn, kiuj en simila lumo prezentas la aferon, ne indas atentigi pri iliaj misoj, sed la esperantistaro devas mem akcepti proprajn kriteriojn kaj per sobra prudento anstataŭ per (verda) koro taksi la aferojn.

La artistojn, kiuj senpage prezentis la programerojn, ni devas tutkore danki, sed mi atentigu

daŭrigo ➔ paĝo 74



*La Koncertejo "Lisinski" antaŭ la solena koncerto*



*Jubilea afiŝo antaŭ la Koncertejo*



*Kantistoj de "Angeĵi"*



*Publiko amase venis*



*Kantas Neven Mrzlečki*



*Gajaĵ lernantoj kantas en Esperanto (supre).*

*Judita Rey-Hudeček, la ĉefa organizanto de la koncerto (supre dekstre).*

*La tri vicprezidantoj de KEL komune spektas la programon (dekstre).*





*Kaja Farszky musikas sur marimbo.*



*Makedona ensemble "Ezerki"*



*Giovanni Furlan kaj infanoj el Lekenik sin prezentas*



*Vida Jerman gvidis la programon*



*Dalmata kantgrupo "Fibula"*



*Vicprezidantoj kaj sekretario de KEL kun honora gasto*



*La kantistoj kaj muzikistoj sursceneje fine de la koncerto*

## ➔ *daŭrigo el la paĝo 71*

pri kelkaj propraj taksoj de la tuto. La kantensemblo "Angeluŝi" sonis bone, la kabaredisto A. Schimmer ne estis tute bona, ĉar la traduko de la unua kanto estis iomete orebora, pro tute malĝuste akcentitaj silaboj. "Ayllu", kiu sur la scenejo troviĝis pro la amikeco al la organizantino Judita (edzino de boliviano), mi vidis ankaŭ en pli bona rolo, ĉar mi spektis ilin ankaŭ pli frue. La kantistoj de "Klapa Fjabela" kantis nacilingve tute bone, dum la prezento de Giovanni Furlan ŝajnis nesufiĉe trejnita, ĉar mi konas lian vivmuzikan kapablon. La danco de romaaj dancistoj ne plaĉis al mi. La muzikado de Kaja Farszky montras ŝian grandan talenton, sed la plej profesieca kaj samtempe esperantisteca estis la kantado kaj gitarludado de Neven Mrzlečki, nia konata

operkantisto. El alia vidpunkto la plej grandajn simpatiojn certe kolektis spontaneco kaj juneco de infangrupo el la elementa lernejo "Davorin Trstenjak" kantinta sub gvido de sia instruistino Silvija Fostač, kun gitarluda helpo de Željko Krušlin kaj Neven Mrzlečki. Ili interalie kantis la tradukon de "Bela estas Zagorje la verda", faritan de Dragutin Štokić antaŭ pluraj jardekoj. En la teksto pri literaturo estas elstarigitaj la sukcesoj de Spomenka Štimec, sen mencio de aliaj gravaj kroataj verkistoj, kio sonis tro pretendeme, malgraŭ ŝiaj evidentaj internaciaj aktivecoj kaj plena respekto al ŝia laboro. Vida Jerman, kiu krome gvidis la tutan prezentadon, el sia repertuaro prezentis iom da nacia kaj iom da internacia programo, kaj la makedona kanthoro "Ezerki" bone prezentiĝis per kelkaj

makedonlingvaj kaj unu makedona kanto tradukita al Esperanto.

Generala impresio estas, ke la programo estis kunmetita el rapide kolektitaj artistoj, kiuj prezetis siajn malnovajn programerojn, kaj ke ĝi ne povus elteni la kutimajn kriteriojn de la Koncertejo "Lisinski", kiu estas loko por grandaj kaj spektaklaj eventoj. Tamen, komparante la situacion en Esperantujo, ĝi povus esti spektaklo por "verda popolo", se ĝi estus prezentita en ties lingvo. Simbolismo de Esperanto ligiĝis nek al ĝia himno (kiel tion faris Rijeka pasintjare), nek al novaj Esperantaj programoj. La sola simbolo estis unu Esperanta flago meze de la scenejo kaj unu granda banderolo sur la fasado de "Lisinski" (skribita en la kroata). Se aliaj vidis la spektaklon alia, mi ne insistos pri praveco de mia konkludo.

# Impresoj pri la koncerto

✍ *Zdravko Seles*

La 26-an de majo okazis en la zagreba Koncertejo "Vatroslav Lisinski" solena koncerto okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto en Zagrebo kaj Kroatio. La koncerto vere estis rakonto pri Esperanto en Zagrebo kaj Kroatio. Per fotoj kaj teksto oni parolis pri iuj gravaĵoj el la kroata Esperanta historio kaj malfermis lokon por kantistoj kaj muzikistoj en la koncerta rakonto. Kvankam tiu sinsekvo estis lerte farita, ligo de iuj rolantoj al Esperanto restis negranda. Ĉio estis populara, simpatia, amuziga; sen tro da paroladoj (paroladoj tute forestis!), sed mi tamen havis iun senton de manko. Tiun popularecon kaj nesufiĉan Esperantan tonon mi sentis iom krokodila. Mi atendis iom da soleneco de "La Espero" kaj pli da Esperanta kantado, kaj - tute nature - gvidadon tra la programo dulingve: Esperante kaj kroate.

Sed, jes, ĉar mankas al ni kroata Esperanta estrado (kial Neven Mrzlečki ne prezentis pli da kantoj?), la programo estis

logika kaj atendebla. Krom la jam menciita sento de manko, cetere mi bone amuziĝis. Anstataŭ kroata Esperanta angulo, ni spertis interkulturecon kaj malfermitecon de esperantistoj en Kroatio: la koncerto estis vojaĝo tra muzikstiloj kaj meridianoj, de la sudamerikaj "Ayllu", kabaredstila (en Esperanto) de Atilla Schimmer, dalmata grupkantado de "Fibula", novkomponita muziko, gajaj elementlernejoj kun (tamen!) Esperantaj kantoj, ĝis Kaja Farszky ĉe marimbo, kanzonoj, impresaj makedonaj popolkantoj de "Ezerki" kaj "Sedum osmini" kaj ĉiuj aliaj.

La sento de manko ne gravas, ĉar ĝi venas de miaj atendoj, sed la rakonto pri Esperanto en Kroatio donis al mi iom da amareco: videblis, ke la gloraj tagoj pasis - nek IKS, nek PIF estas Esperantaj, nek Esperanto vivas en Primošteno, nek plu ekzistas Esperanta radio-elsendo ĉe ni ... Ĉu memorigado povus esti instigo al novaj agadoj, al iu pli forta kroata movado en la dua jarcento?

## Aliaj programoj

La 26-an de majo en **Muzeo Mimara** malfermiĝis ekspozicio de Esperantaj filatelaĵoj, prizorgata de Nikola Turk. Pri la ekspozicio vidu pli detale sur la paĝo 100 de ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto".

La 29-an de majo en **Sveučilišna knjižara** kadre de Nacia kaj universitata biblioteko okazis libroekspozicio kiu prezentis superrigardon de la Esperanta libroeldonado en Kroatio de 1909 ĝis nun. La ekspozicio restis malfermita ĝis la 13-a de junio 2008. La malfermon partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj.

La eventoriĉa semajno finiĝis la 31-an de majo en la bieno de Spomenka Štimec, kie gastis du verkistoj, kroataj akademianoj **Luko Paljetak** kaj **Zvonimir Mrkonjić** kadre de "Meteorita festo", kun sepdeko da spektantoj.



# Sukcesa kaj multekosta

 Spomenka Štimec

Kroata Esperanto-Ligo organizis en majo kelkajn eventojn por omaĝi al la centjariĝo de la unua tutkroata Esperanto-asocio, kiu ekagis en la jaro 1908. La plej granda el la programoj okazis en la koncertejo "Vatroslav Lisinski", kie esperantistoj kongresis dum la Universala Kongreso en 2001. Por la solena koncerto zagrebaj esperantistoj distribuis 1800 biletojn kaj alvenis ĉirkaŭ 1500 spektantoj el diversaj partoj de Kroatio. La konstruaĵo estis ornamita per banderolo CENT JAROJ DE ESPERANTO EN ZAGREBO. Dum pli ol duhora programo ni spektis scenojn el la riĉa historio de Esperanto en Kroatio kiuj estis ilustritaj per diversaj koncertaj muzikeroj. La koncerto komenciĝis per omaĝo al urbo Osijek kie knabinoj ekuzis Esperanton en 1889. Sekvis saluto al la urbo Rijeka, kiu havis la unuan Esperantan klubon en 1907. Por la unuaj Esperantaj eventoj muzikis zagreba ensemblo **Angeluŝi**. La kunlaboron kun la eldono de "Literatura Mondo" ilustris muzika prezento de **Atilla Schimmer**. La agadon de Tibor Sekelj en Sud-Ameriko prikantis

muzikensemblo **Ayllu**. Someran Esperantan Kursejon en Primošten voĉe prezentis Muzikgrupo **Klapa Fjabula**. **Vida Jerman**, kiu gvidis tra la programo, kantis kanzonon el la literaturoj kroata kaj brazila. **Neven Mrzlečki** per "Serenado" de F. Schubert kaj per sia propra komponaĵo "Nostagio" prezentis evoluon de Zagreba metodo de Esperanto-instruado. Helpis al li la agadon de gelernantoj prezenti gaja grupo de gelernantoj el Elementa lernejo Davorin Trstenjak.

Virina voĉa ensemblo **Ezerki** kun orkestro **Sedum Osmi** impone finis la plej multnombrian kroatan Esperantan feston en kiu esperantistoj renkontiĝis kun amikoj de Esperanto en komuna muzika plezuro. La programon reĝisoris **Judita Rey-Hudeček**. La teknikan prezenton prizorgis **Drago Ilišnović**, laŭ la arkivo de KEL.

La koston koncertejon financis Urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto, la artistoj prezentis senpage. Ministro pri kulturo sendis sian reprezentanton por omaĝi al la jubileo.

# Filipiko pri la solena koncerto Etel Zavadlav

Kroatio solenis la unuan jarcenton de organizita Esperanto-movado. Sendube gratulinda afero.

Tiuokaze ni havis eblecon spekti solenan programon en la Koncertejo "Lisinski". Spekti, jes. Ĉiuj kroataj esperantistoj estis invititaj, sed partopreni ĝin povis nur esperantistoj kaj iliaj pli nombraj neesperantistaj gastoj, kaj ĉiuj povis eniri nur havante enirbiletojn, laŭ la kutimo de la koncertejo.

Atente mi sekvis la programon kiu eĉ ne tro enuis, se vi ne estas postulema kaj dorlotita teatremulo. Temas nur pri 100-jariĝo – eble por 1000-jariĝo la festo estos pli lerte kaj pli profesie farita. Bedaŭrinde, pro certa kialo mi ne povos ĝin partopreni, samkiel vi, karaj legantoj. Nu, kion fari? Supera forto!

Feliĉe, ĉi-foje mi estis sufiĉe viva kaj sana por ĝui la magre patosan spektaklon.

Post longa atendado, oni povis aŭdi Esperantan vorton. La tuta programo prezentigis kroatlingve, kio iomete surprizas. Supozeble la gvidantino de la programo jam komencis forgeseti aferojn, interalie fremdajn lingvojn.

La programo mem estis ege bone verkita, se ĝi estus verkita de triaklaso lernanto de elementa lernejo. Ŝajne ĝi tamen estis verkita de plenkreskulo, eĉ ino – tial mi rajtas riproĉi ĝeneralan impreson sengustan, etburĝan kaj siropecan, kiu respogulis la snoban bildon de privatigita Esperanto-movado ĉe ni, kiu ofte estas uzata kiel mempropaganda rimedo,

pruvita per la artikoloj aperigitaj en la ĵurnalo "Veĉernji list".

Nu, jam delonge ni ne miras la profitecon de homa estaĵo kiu ne preterlasos okazon ion gajni por si mem, uzante Kroatan Esperanto-Ligon.

Ĉi-foje mi prenis la taskon verki kritikon, kion mi faras plene sincere.

Insisto pri akcentado de "virina literaturo" montras, ke oni ne opinias inojn egalaj al viroj. Kia diabla "virina literaturo"?! Literaturo estas literaturo, literaturo ne havas sekson. Aŭ viroj ne estas homoj?

Cetere, parolante pri iu poeto: "... Poeton de tiu rango oni ne lasas sur dokoj de eta Kraljevic". Ĉu eblas imagi pli stultan kaj pli snoban frazon, eĉ se vi ne estas maldekstrule orientita?

Pri la ensamblo "Ayllu": enua, laŭ kutimo. Nenia surprizo. Kroma demando: kion komunan havas "Ayllu" kun kroatia Esperanto? Same kiel du junaj romaoj kiuj dancis laŭ usona muziko – ege kroate kaj ege Esperante!

Pri la cetero mi estis kontenta, vere. La plej sukcesa kaj la plej admirinda punkto de la kroatia solenaĵo estis – la makedona koruso. Tio vere respogulis Esperantan spiriton internacian.

Finfine, necesas aserti, ke la organizantoj sukcesis teni nin en bona humoro, proksima al elkora rido. Do, gratulojn al ĉiuj kuraĝaj partoprenitoj. Sendepende de ilia sekso.

# GASTADO DE MONDFAMA INTERLINGVISTO DETLEV BLANKE EN ZAGREBO

*Velimir Piškorec kaj Aleksandra Ščukanec*

De la 18a ĝis la 22a de junio 2008 gastis en Zagrebo fama berlina interlingvisto, esperantologo kaj prezidanto de *Gesellschaft für Interlinguistik* (Asocio por interlingvistiko) doktoro habil. **Detlev Blanke**. La gastado estis realigita kadre de la kontrakto inter Universitato Zagrebo kaj berlina Humboldt-Universitato, kie doktoro Blanke multjare aktivis kiel docento pri interlingvistiko, kaj parte subtenita de la germana faka asocio *Gesellschaft für deutsche Sprache* (Asocio por germana lingvo). Dum sia gastado en Zagrebo doktoro Blanke prelegis sesfoje: kvarfoje en la germana lingvo kaj dufoje en Esperanto. La germanlingvaj prelegoj okazis ĉe Filozofia fakultato kaj estis ĉeestitaj de studentoj kaj docentoj de la germana fako, dum po unu Esperantlingva prelego estis organizita en *Klubo de sciencistoj kaj universitataj instruistoj* kaj en zagreba *Esperanto-Societo "Bude Borjan"*.

La prelegprogramo de doktoro Blanke en Zagrebo komenciĝis lundon, la 19an de majo, je la 8h00 per la germanlingva prelego titolita "Interlingvistiko – objekto kaj aktuala pozicio en la lingvoscienco". La prelegon ĉeestis deko da studentoj de la kvara studjaro de la Germana fako kiuj partoprenas la seminarion pri ekolingvistiko kaj interlingvistiko gvidatan de Velimir Piškorec. Multaj el tiuj studentoj poste ĉeestis ankaŭ aliajn prelegojn de doktoro Blanke pliprofundigante siajn konojn de interlingvistiko.

La dua prelego okazis ankaŭ en la germana la saman tagon je la 11h45 sub la titolo "Internaciaj planlingvoj – karakterizo kaj tipologio". Dum la prelego doktoro Blanke donis

tre interesan superrigardon de internaciaj planlingvoj kion montris ankaŭ postprelegaj demandoj starigitaj kaj de studentoj kaj de docentoj. Ĉeestis pli ol tridek studentoj kaj docentoj de la Germana fako.

Dum la prelego pri internaciaj lingvoj estis konceptita por ĉiuj studentoj de la Germana fako sen antaŭa kono de interlingvistiko, la tria prelego en la germana lingvo pri la vortfarado en Esperanto kaj la germana, okazinta mardon, la 20an de majo, je la 11h00, kiu celis studentojn el la seminario pri interlingvistiko kiuj intertempe dum la seminario akiris bazajn konojn de Esperanto. Surprizo okazis kiam en la prelegejon eniris magistrino Marija Lütze-Miculinić, lektorino pri la germana lingvo kun sia grupo de studentoj partoprenantaj ĉe ŝi la studobjekton "Germanaj lingvaj ekzercoj", pensante ke la prelego de doktoro Blanke estus bona okazo por ŝiaj studentoj ripeti la vortfaradon de la germana, kvankam ili ne lernis Esperanton. Dum la prelego montriĝis ke ŝi pravis pri tio.

La kvara prelego de doktoro Blanke okazinta la saman tagon je la 19h15 en Klubo de sciencistoj kaj universitataj instruistoj kadre de Zagreba lingvista rondo estis titolita polemike "Lingvo desur la skribotablo? Defio por la lingvoscienco". La prelego, kiun ĉeestis plejparte junaj zagrebaj lingvistoj, sed ankaŭ elstaraj lingvistoj kiel nestoro de kroata lingvistiko László Bulcsu kaj polonistino docentino Barbara Kryžan-Stanojević, estis parole kroatigita de Velimir Piškorec. La prelego estis unika okazo por zagrebaj lingvistoj ĉeesti fakan prelegon en Esperanto, kiuj povis konvinkiĝi ke Esperanto estas bone

funkcia lingvo uzebla ankaŭ por fakaj temoj. La bona etoso dum la prelego daŭris ankaŭ dum postprelega bufedo, kie la deko da zagrebaj lingvistoj en leĝera atmosfero babilis kun doktoro Blanke pri diversaj lingvistikaĵoj kaj interlingvistikaĵoj.

Merkredon, la 21an de majo, je la 11h00 okazis en la germana lingvo por studentoj de la Germana fako la kvina zagreba prelego de doktoro Blanke. La unua intenco estis, ke li gastu en seminario pri lingvaj kontaktoj gvidata de Velimir Piškorec, sed eksterorda profesoro de la Germana fako Mirko Gojmerac afable oferis sian prelegtempon kaj belan prelegejon, kie li kutime prelegas pri tradukscienco. Tiamaniere eĉ pli da studentoj ol planite, ĉirkaŭ trideko da ili, kaj kelkaj docentoj de la Germana fako ĉeestis la prelegon titolitan "Esperanto – internacia socilingvistika eksperimento. Kiel el projekto fariĝis lingvo". Interesa estis ankaŭ postprelega, iom polemika diskuto pri esprimeblecoj de Esperanto, instigita de kelkaj duboj de profesoro Gojmerac pri Esperanto.

La lastan, sesan prelegon doktoro Blanke, okazigis Esperantlingve en la zagreba Esperanto-Societo "Bude Borjan" la saman tagon je la 19h00. Dum la lumbilda prelego ĉeestita de dudeko da zagrebaj esperantistoj kaj titolita "Bona Espero en Brazilo – fotoj kaj impresoj pri nekutima institucio" doktoro Blanke parolis pri siaj impresoj kolektitaj dum la restado en tiu brazila institucio en decembro 2007 kaj januaro 2008. Li varme raportis pri la valoro de humanitara laboro kaj edukado por tiel-nomataj eksaj surstrataj infanoj.

La inviton al doktoro Blanke prelegi en Zagrebo





direktis V. Piškorec dum la konferenco de *Gesellschaft für Interlinguistik* okazinta en oktobro 2007 en Berlino, kiam doktoro Blanke bonkore akceptis la inviton. La iniciato pri la gastado ne estus realigebla sen senhezita apogo de vicdekano por scienco kaj internaciaj rilatoj de Filozofia fakultato en Zagrebo profesoro doktoro Damir Boras, estrino de la Katedro por germana lingvo profesorino doktorino Zrinjka Glovacki-Bernardi kaj nuntempa estro de la Germana fako docento doktoro Sladan Turković. Teknikan helpon ĉe la preparado de la gastado liveris kroatflanke sinjorino Tamara Šveljo, kunordigantino pri gastado de eksterlandaj fakuloj ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo kaj germanflanke doktorino Barbara Gollmer, respondeculino pri instruado kaj studo ĉe Filozofia fakultato II de berlina Humboldt-Universitato. Scienca novico de la Skandinava fako de zagreba Filozofia fakultato kaj sekretario de Zagreba



*Filozofia fakultato  
la 19-an de majo*

 **Aleksandra  
Šćukanec**



*Filozofia fakultato  
la 21-an de majo*

Konklude oni danku al doktoro Blanke pro lia preteco veni al Zagrebo kaj prelegi tie, sed ankaŭ al ĉiuj ĉeestintoj de liaj prelegoj kaj al tiuj kiuj ebligis lian sendube sukcesplenan kaj rememorindan restadon.



*Filozofia fakultato  
la 19-an de majo*

lingvista rondo Zvonimir Novoselec menciindas pro sia preteco gastigi doktoron Blanke en tradicirica Zagreba lingvista rondo. Menciindaj estas ankaŭ sciencaj genovicoj de la Germana fako, sinjorino Aleksandra Šćukanec kaj sinjoro Kristian Novak pro sia sindonema teknika helpo dum la restado de doktoro Blanke en Zagrebo.

La gastado de doktoro Blanke estis ne nur unika okazo por studentoj kaj docentoj de Filozofia fakultato en Zagrebo kaj kroataj lingvistoj informiĝi pri interlingvistiko kaj esperantologio, sed ĝi ankaŭ montris, ke en Zagrebo kaj Filozofia fakultato regas bona klimato rilate al temoj kiujn oni ne tre ofte pritraktas ĉe universitata nivelo aŭ eĉ ignoras ilin.



*Filozofia fakultato  
la 19-an de majo*

# ZAMENHOF EN LOTERIBILETO

 **Laŭ Hispana Esperanto-Federacio**

La portreto kaj la nomo de Zamenhof ornamis loteribiletan de la hispana blindulara organizo.

La Organizo de Hispanaj Blinduloj (konata per la siglo ONCE) estas certe unu el la plej sukcesaj en la tuta mondo, pro siaj laboroj en la integriĝo de blinduloj en la socio. Granda parto de la sukceso ŝuldiĝas al ties loterio, tre konata en la tuta lando per la nomo "Cupón". Tiu "kupono", vendata ĉiutage, kaj kun specialaj premioj en difinitaj tagoj de la semajno, montras foje specialajn bildojn kun diversaj motivoj.

Ni povas informi al vi, ke la kupono de la loteribiletto por 17-a de majo portis la portreton de D-ro Zamenhof, kun la teksto, "L. L. Zamenhof, creador del esperanto, precursor en la creación de un mundo para todos", kaj apude "2008, Año Internacional de los Idiomas" ("L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pioniro en la kreado

de mondo por ĉiuj, 2008, Internacia Jaro dela Lingvoj").

La iniciaton por tiu ĉi demarŝo prenis laborgrupo kiu en la sino de Hispana Esperanto-Federacio organizis diversajn agadojn por la kunmemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008, koincide kun la centjariĝo de UEA, kiujn oni povas legi en <http://www.esperanto.es/projekto08/>. Grandan meriton oni ŝuldas al la demarŝoj faritaj de nia samideano Pedro Zurita, kiu dum multaj jaroj okupis la postenon de ĝenerala sekretario en la Tutmonda Unuiĝo de Blinduloj.

Estis antaŭvidita gazetarkampanjo en Hispanio por informi al la komunikiloj pri Esperanto kaj la agado ĉirkaŭ la Internacia Jaro de Lingvoj. Ĝi komenciĝis kelkajn tagojn antaŭ la lotado, kaj estis kunordigata de la organizo por blinduloj mem.



## REZOLUCIO DE POLA PARLAMENTO

La pola parlamento la 12-an de junio unuanime per 397 voĉoj aprobis rezolucion, kiu omaĝas la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio kaj donas sian subtenon al la kandidateco de UEA por la Nobel-premio pri paco. Laŭ la parlamento, temas pri omaĝo al la daŭrigantoj de la verko de Ludoviko Zamenhof, kiu "kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblecon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝo sendepende de la nacieco, raso, religio kaj propraĵa mondkonceptoj".

La rezolucio ankaŭ konstatas, ke "Esperanto ligas homojn en riĉa kaj valora kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco". Tial la pola parlamento opinias, ke UEA ricevu Nobelan pac-premion: "La sejmio, dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo subtenas la klopodojn de internaciaj medioj, ke UEA estu honorita per la paca Nobel-premio".



La 74-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2008 en Eduk-rekapabligna porblindula centro en Premantura (Istrio, Kroatio). La loĝado kaj manĝado por la kongresanoj estos organizita en la sama konstruaĵo de la Centro, adaptita por memstara moviĝo de nevidantoj de ĉambroj al restoracio aŭ salono kaj korto. Eĉ parto de alplaĝa vojo estas indikita per malalta rando palpebla per bastono. Kadre de la Centro troviĝas 26 dilitaj ĉambroj ekipitaj per banejo kaj necesejo, kaj preskaŭ ĉiuj havas ankaŭ balkonon. La Centro posedas restoracion kun teraso, propra kuirejo, kafejo, du salonoj.

La kongresa temo estas "Nevidantoj en la medio - vivo en grandaj urboj". Aŭspicias la kongreson Minsiterio pri protekto de medio, spacplanado kaj konstruado.

La limdato por aliĝoj pasis la 30-an de aprilo, ĝis kiam estis registritaj 63 aliĝoj el 14 landoj (Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Danio, Finnlando, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Nederlando, Rumanio, Rusio, Serbio kaj Ukrainio). La nevidantajn aliĝintojn helpas ankaŭ 11-membra grupo de esperantistoj el Kroatio. La helpantoj deĵoras en flughavenoj de Zagrebo kaj Pula, kaj en fervojaj stacidomoj de Zagrebo kaj Rijeka.

Prezidanto de Prepara komitato estas s-ro **Antun Kovač, Bisačka 5, 10000 Zagreb, Kroatio, retpoŝto: antun.kovac@mzopu.hr**, sekretario: Dragan Štoković, Divkovićevo 5, 52100 Pula, Kroatio, retpoŝto: stokovic@globalnet.hr. Membroj de la prepara komitato estas: Marija Repac, Štefica Mutak kaj Vjekoslav Morankić.



info@esperanto-turismo.org



## ĈIRKAŬMONDA VOJAĜO DE ESPERANTOTUR

Internacia Klubo ESPERANTOTUR en Bydgoszcz (Pollando) okazigis inter la 14-a de februaro kaj 24-a de marto 2008 la 40-tagan ĉirkaŭmondan vojaĝon tra 20 landoj kaj 4 kontinentoj kun 3 luksaj ŝipkrozadoj. Ni flugis el Pollando tra Britio, Antigo, Portoriko al Dominika Respubliko. De tie ni ŝipkrozadis dum unu semajno tra Sankta Marteno, Dominiko, Grenado, Venezuelo, Arubo kaj sekve dum la dua semajno per la

 Andrzej Grzebowski

Andrzej Grzebowski antaŭ krosŝipo en Novzlando

 Radenko Milošević

### IVAN VUČEVIĆ - INVENTISTO DE DAKTILOSKOPIO

150 jaroj post la naskiĝo  
(20-a de julio 1858 - 25-a de januaro 1925)

Ivan Vučević naskiĝis sur la insulo Hvar kie li frekventis la franciskanajn lernejojn kaj akiris fundamentojn de humanisma kaj naturscienca edukado. Kiel multaj aliaj, ne nur kroatoj sed ankaŭ aliaj eŭropanoj, pro ekonomiaj kialoj li elmigris al Sudameriko, kaj ekloĝis en Argentino.

Eklaborinta en la statistika policoŝefo en Buenos Aires, pro sia laboremo kaj multo da ideoj li ricevis la taskon pri identigado de akuzitoj pri krimoj per la metodo de la t.n. "antropometrio" - mezurante partojn de iliaj korpoj. Studinte aliajn provojn kaj verkojn pri diversaj metodoj de identigado kaj malkovrinte mankojn de la antropometria metodo li rimarkis, ke oni ne povas trovi du identajn haŭtliniojn sur polma flanko de fingropintoj. Tiel li disvolvis sian propran metodon de klasifado laŭ la fingropintaj linioj. La metodon komence li nomis "ikonofalangometrio", ŝanĝinte ĝin pli post al "daktiloskopia".

En 1891 li fondis Servon por identigado en La Plata kie la 10-an de septembro li komencis krei dekfringan daktiloskopian kartonon por identigado de personoj. Kiam

li per tiu metodo la unuan fojon en la jaro 1892 solvis duoblan hommortigon, la Kasacia Kortumo de Buenos Aires oficialigis tiun metodon. Iom post iom el Sudameriko la metodo disvastiĝis kaj fariĝis helpilo por homidentigado kaj neevitebla en polica laboro.



sama ŝipo "Legend of the Seas" tra Sankta Kitso - Gvadelupo- Martiniko- Barbadoso - Sankta Lucio. Poste ni traflugis Usonon vizitante Novjorkon - Ĉikagon kaj Los-Anĝeleson de kie ni flugis al Aŭklando. La tria 12-taga ŝipkrozado per "Sapphire Princess" gvidis ĉirkaŭ Novzlando kun Fjordlando - Tasmanio al Melbourne - Sidnejo. El Aŭstralio ni revenis tra Honkongo - Ĉinio al Pollando. Ĝi estis la plej luksa ĉirkaŭmonda vojaĝo de Esperantotur, sed relative favorpreza. Ĝi kostis 8.000-10.000 usonajn dolarojn, depende de la aliĝdato, elektitaj kajutoj kaj fakultativaj programoj. Ĉiu el la 11 vojaĝantoj ŝparis po 2.000-5.000 usonajn dolarojn, ĉar ĉiu aliĝis kaj pagis pli ol 6 monatojn antaŭ la vojaĝo. Unu tago de ŝipkrozado kostas inter 50 kaj 100 usonajn dolarojn kun abunda plurfoja manĝado, tranoktado en dupersonaj kajutoj kun riĉa surŝipa programo kaj ŝipvojaĝo. Per la sama mono en Usono vi povas ricevi nur tranoktojn. Do se vi ŝatas bone kaj multe manĝi, fakte la tranoktoj, la tuta ŝipvojaĝo kaj bonega programo estas senpagaj. Uzante Esperanton surŝipe, kie vojaĝas proksimume 3.000 pasaĝeroj kaj 1.000 membroj de ŝipanaro, eblas bone reklami Esperanton, ĉar turistoj ripozante havas tempon interesiĝi pri Esperanto.

Ĉiutage ŝipkrozadas tra maroj kaj oceanoj per ĉ. 150 luksaj ŝipoj preskaŭ duonmiliono de homoj. Tiu komforta turismo taŭgas por aranĝi dum ŝipkrozadoj Esperanto-seminariojn, konferencojn kaj eĉ kongresojn, se oni frue aliĝas. Ankoraŭ eblas favorpreze aliĝi al kelkaj ŝipkrozadoj ĉirkaŭ Suda Ameriko kaj Azio okazantaj en la lastaj monatoj de 2008 kaj komence de 2009.

## **MALFERMA TAGO LA 28-an FOJON**

La 28-a Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA okazis la 26-an de aprilo, kaj pasis en atmosfero de la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Alvenis 125 vizitantoj el 19 landoj, inter ili ankaŭ ĉiuj estraranoj de UEA, kiuj tuj post la Malferma Tago havis 3-tagan kunsidon. La vizitintoj aŭskultis du prelegantojn. Probal Dasgupta prelegis pri "Historio por malfermi la estontecon" kaj Ziko van Dijk du parte prelegis pri "UEA tra la tempoj". Grupo "Kajto" donis du unuhorajn koncertojn por la publiko, dum la programeron "TEJO sin prezentas" prizorgis Gregor Hinker, prezidanto de la junulara sekcio de UEA, kun la TEJO-volontulino Julia Noe. Okazis skriba kvizo kaj prezento de novaj varoj de la Libroservo. Suma vendo de la Libroservo estis 3.135,87 eŭroj. Kiu do diras, ke la Esperanta libromarkato ŝrumpas?

## **RADIO ESPERANTO**

Antaŭ iom da tempo "La Ondo de Esperanto" lanĉis sonprogramojn titolitajn "Radio Esperanto", kiuj aŭskultebblas ĉe <http://Aa-ondo.rpod.ru/>. Radio Esperanto estas abonebla ĉe <http://Aa-ondo.rpod.ru/rss.xml>

## **REVUO "ESPERANTO" DENOVE PRESATA EN NEDERLANDO**

Post kvin jaroj da presado en Slovakio (januaro 2003 - februaro 2008), la revuo "Esperanto" de UEA, denove estas presata en Nederlando. En la pasinta jaro la kostoj de la revuo superis la buĝeton per 9000 eŭroj. La redaktadon tamen daŭre faros Stano Marček, kies kontrakto renoviĝas aŭtomate ĉiujare, se la estraro ne faros alian decidon plej malfrue en aŭgusto de la antaŭa jaro. Pri la revenigo de la revuo al Nederlando oni pensis jam antaŭ du jaroj, sed tiam Stano Marček marĉandis malpli altan prezon en Slovakio. Tamen, la galopado de la prezoj, ĉefe post la aliĝo de Slovakio al Eŭropa Unio, devigis UEA revenigi la gazeton al Roterdamo, kie ĝi estas presata ekde marto ĉe Thieme MediaCenter kaj dissendata de la kompanio DHL. La ŝparoj po unu

numero estos inter 1200 kaj 1500 eŭroj. La preskvanto estas 5000, pagitaj abonoj ĉirkaŭ 4000.

## **INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN 2009 OKAZOS EN ĈEĤIO**

Laŭ la decido de TEJO-estraro, la 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en 2009 en la ĉeĥa urbo Liberec. La taskon de organizado transprenis Ĉeĥa Esperanto Junularo, kune kun la Gemana kaj Pola Esperanto Junularo, ĉar la urbo Liberec troviĝas en triangulo de la landlimoj de tiuj tri landoj. La 65-a estos la unua IJK okazonta en Ĉeĥio. Ĝi okazos inter la 18-a kaj 25-a de julio 2009, senpere antaŭ la UK en Bjalistoko.

## **EŬROPA ESPERANTO-UNIO RICEVOS SUBVENCION DE EŬROPA UNIO**

Eŭropa Esperanto-Unio ricevos subvencion de Eŭropa Unio por digni oficiston kaj pagi luon de oficejo en Bruselo. La subvencio estos uzata ankaŭ por plibonigo de la Esperantlingva Vikipedio kaj por okazigo de forumoj pri lingvaj rajtoj kaj pri "racia sistemo de multlingveco" en dudek landoj de Eŭropa Unio. La buroo EACEA (civitanaj aktivecoj) de la Eŭropa Komisiono decidis dum la kuranta jaro pagi al Eŭropa Esperanto-Unio la sumon de 56.000 eŭroj, kiu kovru 80 procentojn el la kostoj. La ceterajn 20 procentojn promesis finaci la japana mecenato Etsuo Miyoshi. Laŭ Eŭropa Esperanto-Unio, la subvencio estas "rezulto de serioza laboro de la nuna estraro kaj la oficistino Maja Tišljár". La subvencio laŭplane kovros ankaŭ la kostojn de eŭropa Esperanto-konferenco kadre de Itala kongreso en Grosseto, kaj kelkajn aliajn agadojn, kiujn Eŭropa Esperanto-Unio prezentis en plano transdonita kune kun la subvencipeto.

## **MEZORIENTA RENKONTIĜO EN JORDANIO**

En Amano (Jordanio), de la 11-a ĝis la 14-a de aprilo okazis la Unua Mezorienta Kunveno, kun partoprenantoj el Israelo, Jordanio, Dubajo, Turkio kaj Eŭropo. La kunveno okazis en hotelo Palmyra, troviĝanta apud la universitato

de Jordanio, kaj ĝin organizis Renato Corsetti, Hind Hussein el Jordanio kaj Tom Juval el Israelo. Partoprenis dudekvkino da diverslandaj esperantistoj.

## **DUDEKLINGVA FILMO PRI ESPERANTO**

Tri jarojn laboris internacia teamo, kiu renkontiĝis nur per interreto. Ĝi produktis sespartan, 43-minutan filmon "Esperanto estas..." Volontuloj provizis la filmon per 20-lingva traduko. La ĉefaj kunlaborantoj estis Rogener Pavinski el Brazilo, Hokan Lundberg el Svedio, Petro Baláž el Slovakio, Aaron Chapman kaj Charlene Daely el Kanado kaj aliaj. Interesaĵo de la projekto estas, ke ĝin finance subtenis la sveda Ido-fondaĵo per 20.000 svedaj kronoj kaj Esperantic Studies Foundation per 3000 usonaj dolaroj.

## **MILOJ DA ĈINOJ ĈE LINGVA FESTIVALO**

La unua Lingva Festivalo en Ĉinio allogis pli ol 13.500 ĉeestantoj. Laŭ Dennis Keefe, direktoro de la Festivalo, kredeble estis atingita nova monda rekordo pri kvanto de Esperanto-kursanoj dum unu aranĝo. La Festivalo okazis ĉe la prestiĝa Universitato de Nanjing, kies vicestro de la Fako pri Aplikitaj Lingvistiko, Cuo Jian Hua, nun proponas al la universitato dungi instruistojn, kiuj krom sia gepatra lingvo povas aldone instrui Esperanton.

## **JAPANAJ SEKURSERVOJ STUDAS ESPERANTON?**

La germana periodaĵo "Spiegel" en sia retejo supozas, ke la sekurservoj de Japanio eknerviĝis, ĉar kontraŭuloj de la planata G8-pintkunveno uzas Esperanton, lingvon kiun la sekurservoj ne komprenas. En la ampleksa artikolo la germana retejo skribas: "Nun ankaŭ la sekurservoj de Japao subite ekinteresiĝis pri Esperanto. Ili timas la demonstracion de batalema Esperanto-minoritato en la norda insulo de Hokkajdo, kie la sekva G8-pintkunveno okazos de la 7-a ĝis la 9-a de julio." La asocieto kun la nomo Libera Esperanto-Asocio en Hokkajdo tiel subite ricevis grandan tutmodan atenton, sed la ĉefajn fortostreĉojn por tiu diskonigo faris la japana ŝtato,



malpermesante la enveturon de la germana aktivulo Martin Krämer.

**BULLER VIZITIS MOSKVO**  
Kvankam la propono pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Moskvo havis siajn fazojn de eksploda kolizio inter UEA kaj REU, la paroltonoj iomete mildiĝis, kaj la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller anoncis esplorvojaĝon al Moskvo. Tiu vojaĝo efektive okazis meze de majo. Buller alvenis al Moskvo la 17-an de majo por inspekti la surlokajn kondiĉojn. Akompanita de Gennadij Silo, la estro de la privata universitato Justo kaj Andrej Grigorjevskij, la prezidanto de Rusia Esperanto-Unio, Buller

unue ekskursis en Moskvo, poste prelegis al studentoj de la universitato Justo pri UEA. Estis vizititaj la kongresejoj Olimpijskij kaj Kosmos. Sekvis renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj en la Esperanto-klubo "Leo Tolstoj". La 20-an de majo Buller estis akceptita de moskvaj oficialuloj (vicurbestro, reprezentanto de la internacia fako de la urbestrejo kaj vicestro de ties kleriga fako). La vicurbestro A. V. Petrov ripetis la inviton de la urbestro Lujkov, ke UEA venu kongresi en 2010 al Moskvo. En la interparolo estis traktitaj pluraj anticipe preparitaj demandoj. La vizito de Buller finiĝis la 21-an de majo. Ĉu en 2010 ni kongresos en

Havano aŭ en Moskvo, ni scios baldaŭ - post la UK en Roterdamo. Observante la kutiman ritmon de UEA okazigi laŭeble du kongresojn en Eŭropo kaj unu ekster-Eŭrope, pli grandajn ŝancojn havas Havano, ĉar post Roterdamo kaj Bjalistoko, Moskvo ŝajne estus la tria en tre malvasta regiono. Tamen, se ni diru pli honeste, Moskvo devus ricevi la UK-on almenaŭ pro tio, ĉar Esperanto ja naskiĝis en iama Rusio, ke ĝiaj plej multaj kaj plej varmaj adeptoj estis rusoj, ke la unua lernolibro estis tiu por rusoj, kaj ke ankaŭ hodiaŭ la movado en Rusio estas sufiĉe forta. Malgraŭ tiuj faktoj, Rusio neniam ĝuis la atmosferon de UK.

## AL MEMBROJ DE SAT EN KROATIO

SAT havas novan perantinon por Kroatio, kiu ŝatus starigi kontakton kun ĉiu membro de SAT unuope. Tiucele vi povas libere kontakti ŝin, per retmesaĝo, telefono aŭ poŝto.

La perantino planas partopreni la 81-an SAT-

kongreson, ĉi-jare en Kazanlako, Bulgario, inter la 8-a kaj 16-a de aŭgusto. Se la tien vojaĝontaj SAT-anoj povas formi grupeton, estus pli agrabla vojaĝo.

Grava avizo! Se vi pagas jarkotizon, bonvolu en la rubriko "kialo de enpago" noti vian

nomon, por povi kontroli staton de SAT-bankokonto.

**Etel Zavadlav**  
**Luĉičeva 7**  
**HR-21000 Split**  
**Telefono: 021/319-504**  
**kaj 092/200 56 60**

**Retadreso:**  
**etel.zavadlav@gmail.com**  
**Konto: 2340009-3211351777 PBZ**

## SOLENAĴO EN BANJA LUKA

 **Miĉo Vrhovac**



Urba Esperanto-societo "La Mondo" el Banja Luka la 27-an de majo organizis modestan solenaĵon dediĉitan al novaj membroj kiuj sukcese finis ekzamenon pri scipovo de Esperanto (elementa grado). Post la ekzameno estis preparita koktelo por novaj kaj malnovaj membroj dum kiuj oni parolis pri planoj por kuranta jaro. Ĉiuj kursanoj ricevis diplomojn kiujn al ili

enmanigis ilia instruisto Miĉo Vrhovac, prezidanto de Esperanto-societo "La Mondo".

La kurso komenciĝis en februaro kaj okazis en Centro "BeL@Espero", partnero en la projekto. La kurson komencis konata instruistino el Beogrado s-ino Tereza Kapista kaj daŭrigis kaj finis s-ro Miĉo Vrhovac. La gekursanoj dum la kurso povis vidi prelegojn de Tereza Kapista "Japanio el mia angulo" kaj "Brilo kaj mizero de Brazilo". La prelegojn ĉeestis anakŭ neesperantistoj en Banja Luka kaj la najbara urbeto Ĉelinac.

Profesoro d-ro Ljubiša Preradović parolis pri prov-SUS de AIS el San Marino kiu okazos en Banja Luka de la 31-a aŭgusto ĝis la 6-a de septembro. Estos bona ŝanco por viziti diversajn kursojn kaj prelegojn de estimataj profesoroj. Profesoro Ljubiša Preradović gvidos kurson pri informadiko kaj s-ro Miĉo Vrhovac prelegos pri turismaj ofertoj de Respubliko Serba. Kelkaj membroj de Esperanto-societo "La Mondo" intencas partopreni tiun aranĝon.

La jaro 2008 estas proklamita jaro de lingvoj kaj banjalukaj esperantistoj preparos kelkajn programojn (ekspozicio, lingva festivalo) dediĉitajn al lingvoj kaj komunikaj problemoj en la mondo.

# FALSA PREĜO

*Ivan Trifonov Minĉev*

Tute normale en vilaĝo vivis familio konsistanta el avo, avino, filo, bofilino kaj du genepoj.

La avino, maljunulino, ĉiam post vespermanĝo diradis: "Mi estas oldulino, vane kaj senutile mi manĝas panon. Antaŭ longe mi devis esti entombigita. Mi laciĝis pro tiu vivo, mi preĝas Dion ke li prenu min en paradizon, ke li ordigu mian ripozon sub malvarmeta roza ombreto". Ŝi ĉiuvespere deklamis tiujn vortojn, kiel antaŭdorman preĝon al Dio.

La ripetado ektedis al gefamilianoj, pro kio ili decidis fari ŝercon kaj akiri konfirmon, ĉu la avino sincere preĝas, ĉu vere ŝi deziras forlasi la mondon, t.e. ĉu ŝi deziras morti.

Iun vesperon la filo aliigis la voĉon kaj en nokta mallumego ekfrapis sur enirpordo. La avino aŭdis la frapon kaj demandis: "Kiu vi estas, kial vi frapas kaj kion vi deziras dum tia malfrua horo - preskaŭ noktomeze?"

De ekstere aŭdiĝis severa voĉo: "Mi estas morto.

Ĉiun vesperon de via domo mi aŭdas virinan preĝon al Dio. Por plenumi ŝian preĝon, Dio sendis min kun grupo da diabloj, preni tiun ĉi virinon kaj realigi ŝian preĝon!"

La avino ege ektimis, tuj kaŝiĝis en tenejo kaj ekkriis: "Bofilino, bofilineto, afable min anstataŭu, iu frapas ĉe la pordo! Vi estas juna, vigla, pli movebla, iru malfermi la pordon, vidu kiu estas kaj kion li deziras dumnokte!"

Kiam la bofilino

malfermis la enirpordon kaj vidis sian edzon, la filon de la preĝanta avino, ĉiuj ekridegis, nur la avino sentis sin trompita, iomete ofendita, kaj ŝi ĵuris ke ŝi ĉesos preĝi Dion, ĉar la dia paradizo estas nur imagebla, sed vera paradizo estas surtere, ĉe la familio.

Normala konduto estas, ke ĉiu homo deziras longe vivi, sed neniu deziras maljuniĝi kaj morti. Ĉiam la morto venas tute neatendite, surprize, sen Dia komisio.



**Antun Branko Šimić**

**Antun Branko Šimić  
(1898-1925)**

## MALPLENA ĈIELO

*Ĉiel' estas jam longe malplena  
sen Dio kaj seraĵoj jenaj,  
griza dezert' senfina  
tra kiu flugas sporade birdego maŝina.*

*Ne flugas plu animoj kiel hirundoj.  
Homo ekkuŝas kaj forputras en grundo.  
Perdis ni vojon al Dio.  
Poetoj silentas starante antaŭ nenio.*

Esperantigis: Boriša Milićević

**POR APERIGI RECENZOJN EN NIA GAZETO,  
BONVOLU SENDI AL NIA REDAKCIO DU  
EKZEMPLEROJN DE KONCERNA VERKO**


## CERBAJ IMPULSOJ *Dinko Matković*

1. Maljunaj kaj malnovaj esperantistoj ne similas al fosilioj se ili ankoraŭ aktivas.
2. La centjara datreveno de Universala Esperanto-Asocio estas pruvo, ke la disbranĉita verda arbo ne povas velki.
3. Esperanto estas plane konstruita lingvo, sed tio ne signifas, ke ĝi estas artefarita lingvo, ĉar ĝia vorta trezoro enhavas internaciajn vortojn kaj aliaj vortradikoj estas prenitaj de "vivaj" lingvoj.
4. Esperanto-kongresoj similas al biblia priskribo de la langoformaj flamoj kiuj brulis super partoprenintoj el diversaj triboj kaj ĉiu povis kompreni kion parolis Sankta spirito.
5. Rilate al sukceso de Esperanto mi ne estas nur esperanto.



# TELEGRAFE

De la 21-a de aprilo ĝis la 18-a de majo en la montrofenestroj de Volksbank en la zagreba strato Rački 9, troviĝis ekspozicio pri Esperanto, kiun organizis Gordana Kovač-Bluha.



\*\*\*

"Rakontoj sub la lito" de Antoaneta Klobučar el Osijek estis pere de Esperanto tradukitaj en la japanan kaj eldonitaj de la tradukinto Sekoguchi Ken.

\*\*\*

"Kroata milita noktlibro" de Spomenka Štimatec fine de 2007

## KOREKTO

En la lasta n-ro de "Zagreba Esperantisto" (2/2008), en la artikolo "Jarkunveno en Split" sur la paĝo 60, estis malĝuste notite, ke Ivo Puharić estis elektita kiel membro de la estraro de Esperanto-societo "Split". Efektive temas pri Ivo Perković. Mi pardonpetas pro la eraro kaj petas publikigi korekton.

*Davor Grgat (Split)*

estis eldonita en la ĉina traduko de Shi Chengtai.

\*\*\*

La 21-an de junio en Eŭropa domo en Zagrebo prelegos Neven Kovačić pri eŭropa temo.

\*\*\*

La 16-an de julio prelegos Josip Pleadin en OSIEK-konferenco en Šempeter (Slovenio) pri la temo "Kontribuo de kroataj esperantistoj al originala kaj traduka literaturo en Esperanto".

\*\*\*

Humphrey Tonkin en la revuo "Language Problems @ Language Planning" recenzis anglalingve la verkon de Josip Pleadin "Ordeno de Verda Plumo".

\*\*\*

La 5-an de junio fotojn el la baltlanda vojaĝo okazinta en 2005 (UK en Vilnius), prezentis Faruk Islamović en Montgrimpa klubo de Kroata kuracista organizaĵo en Zagrebo.

\*\*\*

Esperanto-societo "Libriga Stelo" en Osijek okazigis

sian jarkunvenon la 12-an de majo.

\*\*\*

Unuiĝo por Esperanto "Viktor Mihovilić" el Karlovac, okazigis sian jarkunvenon la 13-an de junio.

\*\*\*

Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo okazis la 5-an de majo en Zagrebo.

\*\*\*

IKUE-anoj renkontiĝos en Rimini (Italio) inter la 30-a de aŭgusto kaj 6-a de septembro en sia 61-a kongreso.

\*\*\*

En Duga Resa okazos inter la 2-a kaj 8-a de aŭgusto Magiverda Internacia Renkontiĝo (MIRO).

\*\*\*

Esperantaj verskitoj renkontiĝos inter al 15-a kaj 17-a de aŭgusto. en la bieno de Spomenka Štimatec en Hrašovina-Trgoviče.

\*\*\*

Ankoraŭ vi povas aliĝi al karavano de Orbis Pictus al 93-a UK en Roterdamo.

En la unua aperjaro, nia redakcio disponigis certan kvanton da senpagaj abonoj al nepagipovaj esperantistoj. Ekde 2008 estas malfermita aparta

## ABONHELPA FONDUSO

al kiu ĉiu esperantisto, leganto aŭ abonanto, povas donaci certan sumon. El la kolektita sumo estos pagataj abonoj por nepagipovaj esperantistoj, ĉefe en landoj de Afriko kaj Azio. La pagojn bonvolu direkti al nia konto ĉe UEA: **plea-k** (kun mencio: "Abonhelpa fonduso"), aŭ enlande rekte al nia redakcio per poŝtmandato aŭ pagante al ĝirkonto de "Grafokom" (vidu la paĝon 2).

### Saldo

56. Željko Gubijan (Vrbovec)	<b>361,18 eŭroj</b>
57. Krunoslav Tišljar (Zagreb)	6,80 eŭroj
58. Rainer Haupt (Hamburgo)	10,20 eŭroj
59. Zdenka Polašek (Bjelovar)	5,00 eŭroj
	10,20 eŭroj

### Ĝis nun kolektitaj:

**481,19 eŭroj**

**Dankon al ĉiuj ĝisnunaj donacintoj.**



*Dum la ekskursa tago*

 *Josip Pleadin*

# HISTORIA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ ĴURNALISTOJ



*La kongreso laboris en la litovia parlamentejo (supre), kie salutis ĝin la prezidanto de la Sejmo, s-ro Česlovas Juršėnas (dekstre, sidanta meze inter H. Tonkin kaj P. Jegorovas)*



*Ĉe la malfermo de la kongreso en la Urbodomo, kolektiĝis sur la podio elektita grupo de litoviaj kaj Esperantaj gravuloj (supre)*

*Kafopaŭzo en la Urbodomo (malsupre)*



*Tutmondeco de la kongreso evidentiĝis ankaŭ dum la kongresa ekskurso (dekstre)*





*Aŭskultante interesajn prelegantojn en la litovia parlamentejo (la unua foto dekstre)*

*Jukka Pietiläinen el Finnlando gvidis unu sekcion de la kongresaj prelegoj (la dua foto dekstre)*



*Diversnaciaĵoj sed samlingvanoj atente aŭskultas la prelegantojn en la litovia parlamentejo (supre)*

*La prezidento de la Sejmo, s-ro Ĉeslovas Juršėnas bonvenige akceptis la gastojn ĵurnalistojn (malsupre)*



*Bankeda tablo ĉe la prezidento de la Sejmo (supre).*

*Davor Grgat en diskuto pri unu el la kongresaj temoj kun H. Tonkin (maldekstre)*

*Choe Taesok redaktas novan numeron de la kongresa kuriero "La Fera Lupo" (malsupre)*



Jurnalismo estas esence grava aktiveco por ĉiu popolo aŭ movado. Kiam la esperantista ĵurnalista organizaĵo TEĴA malformiĝis en 2003, kaj reaperinte en 2005 ne sukcesis havi pli signifan rolon, la Esperanta ĵurnalismo iomete ŝrumpis. Tamen, el tiu koŝmara periodo, la organizaĵo provis denove elgliti al taglumo kaj kapti sian veran taskon inter esperantistoj.

Helpis tiujn strebojn ankaŭ la ĵus finiĝinta Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj Esperantistoj, kiu ŝajnas esti historie grava evento, kies postsekvoj neniu ĉi-momente povas prognozi.

Kiam Litova Esperanto-Asocio lanĉis inviton al ĵurnalistoj esperantistoj aliĝi al la okazinta kongreso, la proponitaj kondiĉoj ŝajnis iomete nekutimaj. Tamen, konante la precizecon de la litova landa asocio, kaj konante la konsiderindan influon de Esperanto en tiu baltia lando, oni ne povis dubi, ke ĉio estas ne ŝerco sed serioza invito. Tial tute ne mirigas la fakto, ke unuloke, en Vilnius, renkontiĝis inter la 26-a kaj 30-a de majo 183 invititoj el 37 landoj por diskuti pri "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". Ĉiuj objektivaj observantoj tuj taksis la aranĝon kiel lokon, kie kolektiĝis la "kremo" de la ĵurnalisma mondo de Esperantujo.

La rolon, kiun transprenis la ĉeestintoj, nome diskuti pri ĉiuj aktualaj kaj gravaj momentoj de la Esperanta ĵurnalismo kaj parencaj temoj, la kunvenintoj traktis en kvindekda diversstemaj prelegoj. Certe unuafoje en la historio de Esperanto okazis tia kunveno, dum kiu oni tiel detale kaj el diversaj aspektoj traktis ĵurnalismen, merkatumon, eldonadon, teknikajn novaĵojn, defiojn, kaj prognozis eblan evoluon de la situacio por provi anticipi la negativajn konsekvencojn de tia evoluo.

La kongresan temon reĝisoris la respektinda profesoro Humphrey Tonkin, kiu gvidis grandan parton de la prelegoj kaj kvalite resumis la diritaĵojn. La

## Josip Pleadin Kongreso kun neantaŭvideblaj sekvoj

kongresan temon oni traktis en tri sekcioj kaj plenkunsidoj.

Granda parto de la kongresanoj alvenis al Vilnius jam dimanĉe, la 25-an. La lundo komenciĝis per tuta ekskurso al unu el la ĉefaj turismaj vidindaĵoj de Litovio - la kastelo Trakai, kie en la ĉelaga restoracio okazis komuna tagmanĝo. Favarataj de la bela ekskursata tago, la kongresanoj uzis senlimajn okazajn por interkonatiĝi kaj preparoli diversajn temojn.

La labora parto de la kongreso komenciĝis la 27-an de majo (mardo) per solena inaŭguro en la granda salono de la malnova Urbodomo, kiun malavare disponigis la urbestro de Vilnius, s-ro Juozas Imbrasas, organizinta samtage ankaŭ akcepton por la kongresanoj. La inaŭguron partoprenis pluraj oficialuloj, inter ili ankaŭ la urbestro mem.

La 28-an de majo, la ĉefministro de Litovio, s-ro Gediminas Kirckilas regalis la kongresanojn per okaza bankedo.

En la Urbodomo okazadis la laborkunsidoj en tri diversaj sekcioj dum la 27-a kaj la 28-a de majo. Plenkunsidoj okazis la 29-an kaj 30-an de majo en la litovia Parlamento, kaj la unuan kunsidon per sia interesa parolado kaj estiminda ĉeestos salutis la prezidanto de la Parlamento Ĉeslovas Jurŝenas. En la solena akcepto ĉe la prezidanto de la Parlamento, okazinta la 29-an de majo, sinjoro ministro en tre malsreĉa atmosfero agnoskis, ke li mem en sia antaŭpolitika kariero estis ĵurnalisto.

La palpebla rezulto de la kongreso esti kunsido de TEĴA, kaj elekto de ĝiaj funkciuloj la 28-an de majo.

Resume, mi povas diri, ke jam delonge mi ne partoprenis tiel perfekte organizitan

Esperantan aranĝon. La hotelo "Ecotel" kie loĝis ĉiuj kongresanoj estas mezkategoria, sed tamen agrabla hotelo en la urbocentro, nemalproksime de ĉiuj salonoj en kiuj okazis la programoj. Ĝi estis "klubo", en kiu okazis eĉ spontanaj koncertoj en la akcepta salono. La manĝaĵoj estis kvalitaj, la servo en respektinda nivelo. Abundis oficialaj akceptoj de gravaj politikaj kaj sociaj personoj. La presitaj kongresaj materialoj neniel postrestis post ekz. la materialoj de UK-oj. La Kongresa libro estis samformata kaj samaspekta kiel tiu de UK-oj. Ĉiutaga plenkolora 4-paĝa kongresa kuriero titolita "La Fera Lupo" estis bone redaktita kaj akurate eldonata, redaktata de korea litoviano Choe Taesok. En la kongresa teko troviĝis ankaŭ pluraj bonkvalitaj profesinivele produktitaj gvidlibroj, kongresa insigno kaj nomŝildo, kovertoj kaj leterpapiroj ... Funkciis libroservo en tre oportuna loko antaŭ la salonoj en la Urbodomo. La oferto estis tre kvalita ĉar ankaŭ aliaj eldonistoj ricevis ŝancon prezentiĝi samkondiĉe kiel la litova Asocio. Multaj eldonistoj alportis reklamilojn kaj ekzemplerojn de siaj gazetoj por senpaga distribuo.

Ne mankis refreŝigaj trinkaĵoj en la enirsalono, kie la ĉeestintoj kolektiĝis dum kafopaŭzoj.

En la kongreso partoprenis tri kroataj esperantistoj (la kvara anoncita ne alvenis), prezentinte du prelegojn kaj kelkfoje reaginte en diskutoj. Kvankam ili venis post pli ol 30-hora trajna/busa vojaĝado, la travivaĵoj kompensis al ili plene la malfacilan vojaĝon. Cetere, la organizanto kovris la kostojn de la vojaĝo en maksimuma sumo de 250 eŭroj por eŭropanoj kaj 500 eŭroj por ekstreŭropaj

partoprenintoj. Tio eblis nur dank al malavara subteno de la ŝtataj institucioj. Sed, la respekto de la ŝtataj institucioj al Esperanto estas verŝajne rezulto de la bona sukceso de Universala Kongreso okazinta en Vilnius en 2005. Tio evidente povas esti bona vojonmontri ankaŭ

por aliaj landoj, kiuj nesufiĉe konscias pri la interinfluo de sukceso de unu afero al potenciala sukceso de alia en estonteco. La litovaj esperantistoj kiuj multkape estis engaĝitaj en la organizado de tiu ĉi kongreso, gviditaj de sperta kaj kapabla Povilas Jegorovas, dum

jaroj montras praktikajn eblojn de kontinua kaj bone organizita laboro.

La Esperanta ĵurnalismo supozeble dum sekvaj jaroj povus rikolti fruktojn de la, ni diru sincere, escepte bone organizita aranĝo.

## Intervjuo kun...

# POVILAS JEGOROVAS

**ZE:** Ĉu vi kiel organizanto estas kontenta pri la kongresaj rezultoj kaj kion la okazigo de tia aranĝo signifas por Litova Esperanto-Asocio kaj Esperanto ĝenerale en Litovio?

**Jegorovas:** Jes, mi estas plene kontenta. Kompreneble, oni povus fari kelkajn aferojn ankoraŭ pli bone, sed tio, kio okazis, eĉ superis miajn esperojn. Litova Esperanto-Asocio kaj enlande kaj por eksterlandanoj vican fojon montris, ke ĝi kapablas bone efektiviĝi iniciativajn projektojn kaj estas fidinda organizaĵo. Tio estas tre grave por estonto - ankaŭ estonte ni eĉ pli multe povos ĝui subtenon de diversaj ŝtataj institucioj kaj de litova socio ĝenerale. Prestiĝo de Esperanto ankaŭ kreskis. En Litovio ĝi ĝenerale estas konsiderata kiel serioza afero. Ankaŭ enhave (programe) la kongreso estis fruktodona kaj grava.

**ZE:** Kio efektive estis la rezultoj de la aranĝo?

**Jegorovas:** Estas ankoraŭ malfacile taksii signifon de la aranĝo kaj ĝiajn rezultojn. Sendube ĝi estis unika aranĝo. Kaj ĝiaj rezultoj ankaŭ estas duflankaj - por Litova Esperanto-Asocio kaj Esperanto en Litovio ĝenerale kaj por la Esperanto-movado tutmonde ĝenerale. Pri Litovio mi jam parolis. Por la tutmonda movado la kongreso

**Povilas Jegorovas, unu el la ĉefaj figuroj de litovia Esperanto-movado, sen kies plena engaĝiĝo ne okazus ankaŭ la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj Esperantistoj bonvolis respondi al kelkaj demandoj de nia gazeto.**



montris, ke efektive oni povas fari iom tre gravan iniciaton ankaŭ en la nuna, ŝajne, senespera por Esperanto mondo. Eblas esti nemarĝena movado kaj aranĝi nemarĝenan aranĝon. Eblas atingi, ke oni traktu nin serioze kaj estime. Tiu-ĉi kongreso devus multe kuraĝigi esperantistojn en ilia laboro. Ankaŭ la fakto, ke ni sukcesis kolekti en unu lokon eliton (kremon) de la movado kaj kompili altnivelan kongresan programon montras forton de la movado ĝenerale kaj eblecojn kaj kapablojn de la esperantistoj tutmonde.

**ZE:** Jam nun ŝajnas, ke temis pri unuaranga evento en Esperantujo. Ĉu vi bonvolus prognozi la evoluon de ĵurnalisma afero en sekvaj jaroj?

**Jegorovas:** Mi ĉi-tie rolis ne kiel ĵurnalisto, ĉar mi ne estas tia, sed kiel organizanto. Tial mi ne kuraĝas prognozi tion. Sed la fakto, ke la kongreso kreis

eblecon reviviĝi por TEĴA estas sendube pozitiva kaj, espereble, ekde nun TEĴA denove estos grava faka organizaĵo de esperantistoj. Sed tio jam ĉefe dependas de nova Estraro de TEĴA kaj de ĉiuj esperantistoj-ĵurnalistoj. TEĴA, laŭ mi, estas tre grava faka organizaĵo, ĉar ĝi funkcias en kampo de informado, kio por la movado estas esenca afero. Tial mi bondezirus, ke ĝi kresku minimume ĝis la grado, ekzemple, de ILEI, kiu ankaŭ funkcias en alia grava tereno - instruado.

**ZE:** Ĉu vi bonvolus menci la instituciojn kaj individuojn, kiuj estas plej meritaj kaj kiuj plej multe helpis okazigon de la kongreso?

**Jegorovas:** Ĉefaj instancoj, kiuj signifne helpis por aranĝi la kongreson estas jenaj: Litovia Registaro (ĝi preskaŭ centprocente financis la kongreson) kaj la ĉefministro Gediminas KIRKILAS (li estis alta protektanto de la kongreso, aranĝis akcepton por la kongresanoj), Litovia parlamento kaj ĝia prezidanto Česlovas JURŠENAS (senpaga disponigo de parlamenta salono por kongreso, ĝenerala apogo, akcepto, persona dufoja veno k.s.), Municipo de Vilnius kaj urbestro Juozas IMBRASAS (disponigo senpaga de la Urbodomo, akcepto, partopreno en la inaŭguro, ĝenerala apogo), Ministerio de eksterlandaj aferoj (favora traktado de vizaj demandoj).

## HUMPHREY TONKIN Reĝisoro de la kongresa temo



ĵurnalista armilo en la batalo por eltrovi la verajn cirkonstancojn.

Ene de la movado, ni bezonas la profesiajn sciojn de ĵurnalistoj – por plibonigi niajn rilatojn kun la gazetaro, por altigi la kvaliton de niaj propraj revuoj kaj gazetoj, kaj por efike cirkuligi movadajn informojn. Espereble la aranĝo en Litovio stimulos tiun agadon.

La kongreso okazis interalie pro malavara subteno de la litova registaro. Certe tiu registaro supozis, ke kongreso de esperantistaj ĵurnalistoj el kvardeko da landoj povus bone efiki por meti Litovion en la konscion de la granda publiko. Mi esperas, ke la partoprenintoj verkos kaj disinformos pri Litovio en la propraj landoj, por montri, ke tiu investo de la litova registaro havas pozitivan efikon, kaj ankaŭ por montri, ke la utiligo de Esperanto en ĵurnalismo povas malfermi mondojn.

## KONTRIBUO DE KROATOJ AL LA ĴURNALISTA KONGRESO

*Davor Grgat*

Kvankam la kongreso de ĵurnalistoj esperantistoj okazis en belega lando Litovio, kroatoj ne partoprenis multnombre kiel ĵurnalistoj de aliaj landoj. Tamen, ili donis konsideridan kontribuon al la kongreso. Dum la kongresaj tagoj (de la 26-a ĝis la 30-a de majo) en Vilno estis organizitaj pli ol 50 fakaj prelegoj sub la kongresa temo "Internacia

interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto", kiun reĝisoris profesoro Humphrey Tonkin.

Post la kunsido de TEĴA, la 28-an de majo, **Vlado Jurković** prelegis pri "Dek kvin jaroj forpasis de kiam silentas E-programoj de Kroata Radio". Temas pri historio de Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo (poste Kroata Radio), kiuj komenciĝis en majo 1953, kaj ekmutis post plenaj 39 jaroj da kontinua

funkciado per arbitra decido de Kroata Radio en 1992. En la postprelega diskuto partoprenis ankaŭ Davor Grgat, kiu atentigis ankaŭ pri ofta elsendado pri Esperanto de Radio Split en pasintaj 30 jaroj. La duan prelegon

La ĵurnalista kongreso en Vilno ŝajnis al mi modela Esperanto-aranĝo, en tio, ke ĝi kunvenigis seriozajn homojn ĉirkaŭ serioza temo – nome restarigo de ĵurnalista agado ene de la Esperanto-movado kaj en niaj eksteraj rilatoj.

Ĵurnalismo estas lingvodependa profesio: ĵurnalistoj devas koni lingvojn por havigi al si informojn kaj bone regi lingvojn por transdoni tiujn informojn al aliaj. Ofte la efikeco de la ĵurnalismo estas limigita pro la limigita lingvokapablo de la ĵurnalistoj mem, kaj de la homoj ĉirkaŭ ili. Se mi alvenas difinitan regionon de la mondo kaj celas kolekti sciojn pri ĝi, mi estas plene dependa je mia propra lingvoscio kaj tiu de miaj informantoj – aŭ de tradukistoj, kiujn mi devos uzi por kolekti informojn. Enkonstruitaj en la uzo de tiuj lingvoj estas plej diversaj antaŭjuĝoj aŭ kulturaj tendencoj ofte nepercepteblaj al eksterstaranto. Kiel neŭtrala lingvo plene internacia, Esperanto povas esti valora



La ĉefredaktoro de "Zagreba Esperantisto" dum la prelego en Vilnius

# KUNVENO DE TEĴA KAJ ELEKTO DE NOVA ESTRARO

 Davor Grgat

Merkredon, la 28-an de majo je la 10h15 en la Urbodomo de Vilnius okazis membrokunsido de TEĴA. Partoprenis la estraranoj **István Ertl**, **Jukka Pietiläinen**, **Dieter Rooke** kaj **Stano Marček**. Forestis estrarano **Kalle Kniivilä**. La kunsidon malfermis Jukka Pietiläinen. Post tralego de agadplano, okazis diskuto. Dum la diskuto Vilhelmo Lutermano proponis, ke TEĴA ne plu estu papera organizaĵo, sed utiligu la novan teknikon de komputiloj.

La membraro, laŭ lia propono, estu organizita en diskutlistoj kaj havu decidpovon. Tio, laŭ li, estas grava por kontakto inter la membroj kaj TEĴA. Giorgio Silfer proponis, ke TEĴA estu registrita kiel neregistara organizaĵo, kaj ke la asocio trovu sian rolon en internacia ĵurnalista asocio. En la diskuto partoprenis Nikolaj Gudskov, Stefan MacGill, Barbara Pietrzak, Davor Grgat kaj aliaj. Okazis diskuto pri la elekto de nova prezidanto. Post voĉdonado kiel prezidanto estis

elektita Audrys Antanaitis, kaj poste elektigis estraro en jena konsisto: **Mariana Evlogieva**, **Aleksandar Korjenkov**, **Kalle Kniivilä**, **Dieter Rooke** kaj **Vytautas Šilas**.

Dum la kunveno oni ne akceptis ian rezolucion. Oni ne diskutis ankaŭ pri la asocia kotizo, kaj pri eventuala eldonado de organo de la asocio. Pri tiuj temoj eventuale oni diskutos antaŭ la UK en Roterdamo, estis dirite fine de la kunveno.

titolitan "Esperanto ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj" prezentis **Josip Pleadin**. "Teknologiaj novaĵoj kaj novaj kondiĉoj en grafika industrio grave ŝanĝis la presteknikojn kaj entute distribuon de informoj", diris Pleadin. "En tiaj kondiĉoj ankaŭ la rolo de ĵurnalistoj draste ŝanĝiĝis. Tiuj ŝanĝoj, kiuj fulme evoluis dum pasintaj dudek jaroj, ankaŭ al Esperanta gazeteldonado peris postulojn pri pli bona kvalito de presajoj, kaj antaŭ E-ĵurnalistojn metas postulojn pri pli rapida reago kaj distribuo de informoj", konkludis Pleadin. Lian prelegon en la ĉefsalono de la Urbodomo partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj.

**Davor Grgat**, la tria kroato en la kongreso ne prezentis apartan prelegon, sed aliĝis al pluraj diskutoj, precipe pri la ĵurnalismo kodekso.

La kongreso en Vilnius por ĉiuj partoprenintoj estos neforgesebla memorajo el pluraj vidpunktoj: la kongreson partoprenis gravaj politikistoj, kio malofte okazas, pro kio ni estis akceptitaj je plej alta nivelo.

## PUBLIKE PRI ESPERANTO

**"Glas Slavonije"** publikigis la 19-an de majo mallongan tekston (verkitan de I. Ku.) titolitan "Esperantisti na Troglavu".

**"Vjesnik"** la 24-an de majo publikigis longan artikolon de sia ĵurnalistino Branka Primorac, kun Esperanta titolo "Cent jaroj de Esperanto".

**"Slobodna Dalmacija"** la 24-an de majo publikigis artikolon verkitan de D.G. (=Davor Grgat) titolitan: "Grgat na kongresu novinara esperantista".

**"Večernji list"** la 26-an de majo publikigis artikolon sub la titolo "Hrvatski savez za esperanto slavi 100. obljetnicu", kiu informas pri pluraj programoj de tiu granda jubileo festata en 2008.

**"Glas Slavonije"** la 27-an de majo publikigis la tekston "Osječke dječje priče oduševile Japance", kiun verkis Lj. Kovačević. La teksto informas pri la japanlingva traduko de la porinfanaj libroj de Antoaneta Klobučar el Osijek.

**"Slavonski dom"** publikigis la 29-an de majo la tekston "Japanske mališane djedovi uspavljaju osječkim pričama!" el la plumo de Melita Berečić. La teksto informas pri japanigo de du libroj de Antoaneta Klobučar.

**"Slobodna Dalmacija"** la 3-an de junio publikigis la artikolon de Davor Grgat "I Hrvati na kongresu esperantista".

**Radio Split** la 6-an de junio je la 9h45 elsendis 6-minutan programon pri Esperanto, en kiu, interalie, Davor Grgat informis pri la partopreno de kroataj esperantistoj en la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj Esperantistoj en Vilnius.

# "BUDE BORJAN" JARKUNVENIS

 **Anto Mlinar**

Pasintnumere vi povis legi pri la programoj de Esperanto-societo "Bude Borjan" el Zagrebo. Ĉi-numere mi dezirus informi vin pri la okazinta jarkunveno de ĉi tiu societo, ĉar ja temas pri la plej multnombra Esperanto-societo nialanda.

Do, la 16-an de aprilo en la granda ĉambro de la komuna sidejo de landa, junulara, studenta kaj urba E-organizajoj, Kneza Mislava 11/III en Zagrebo, jarkunvenis la membraro de "Bude Borjan". Temis pri ordinara, do ne elekta, jarkunveno. Ĝi konsistis el raportoj (aktiveca kaj financa) por la jaro 2007 kaj laborplano por la jaro 2008, kiujn sekvis tre vigla kaj interesa diskuto. Nature, la tagordon eniris ankoraŭ iuj punktoj kiel ekzemple: invito de UZE (Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj) al "Bude Borjan" aliĝi kiel kolektiva membro kaj raporto pri la preparado por festado de centjariĝo de organizita Esperanto-movado en Kroatio kiu daŭros tutan jaron.

La jarraporto pri la laboro en 2007, kiun preparis Spomenka Štimec, estis tre ampleksa kaj mi provos ĝin nur koncize prezenti riskante tiel noti iujn kaj malnoti aliajn eble pli gravajn aktivecojn. Oni povas konstati, ke ĉefaj societaj programoj estis prelegoj kaj konversaciaj vesperoj ĉiumerkrede de januaro ĝis junio kaj de septembro ĝis decembro. Krome, paralele funkciis Esperantlingvaj kursoj por infanoj kaj plenkreskuloj. Interese estas mencii, ke tiuj kursoj formiĝis kiel rezulto de televida Esperanto-kurso organizita de nia membrino Judita Rey Hudeček kaj gvidita en ses epizodoj de lernantino Tena Kuzmanović. Tre sekvinda ideo, ĉu ne!

Aliaj gravajoj el la raporto mialtase estis:

- en aprilo plejmultnombro niaj membroj partoprenis la programon de KEL en Zamenhofa strato memore al mortigitaj familianoj de Zamenhof.

La ŝtatprezidento Mesić sendis florbukedon memore al viktimoj de la holokaŭsto;

- en majo pluraj niaj membroj vizitis programon en Zagorje kiun partoprenis ankaŭ verkisto Igor Mandić kaj literatura kritikisto Velimir Visković. Samtempe niaj membrinoj Judita Rey Hudeček kaj Marija Jerković organizis vojaĝon de niaj lernantoj al Kostrena, kie ili konkuradis en Esperanto-lingvoscio;

- en junio multaj niaj membroj veturis al Hrašćina en Zagorje por partopreni edukan programon, renkontiĝinte kun verkistoj el Pollando (Tomasz Chmielik) kaj Rusio (Mikaelo Bronstein);

- julio kaj aŭgusto jam tradicie apartenas al eŭropa kaj monda Esperanto-kongresoj. La Eŭropan Esperanto-Kongreson en 2007 organize preparis slovenoj en Maribor kaj niaj membroj multnombriis tie. Nia membro Radenko Milošević aktive partoprenis diskutojn pri la konferenca temo "Interkultura dialogo kaj komunikado" kaj nia membrino Judita Rey Hudeček gvidis Infanan kongreseton. Tuj poste okazis en Japanio (Jokohamo) Universala Kongreso, kie denove ne mankis niaj membroj. Iuj el ili eĉ partoprenis unuopajn programerojn (Kaja Farszky, Spomenka Štimec, Vida Jerman, Mirjana Žeželj, Zlata Nanić, Marija Jerković kaj Jagoda Čaldarević);

- en septembro nia membrino Zlata Nanić organizis en sia bieno nomata "Zrno" (Grajno) en vilaĝo Habjanovac jam tradician feston "Tagoj de la tero" kaj ĝiakadre propagandis Esperanton. Tie ni ekkonis ankaŭ familianojn de esperantisto Bude Borjan pereinta en 1941. Honore al li nia societo ricevis sian nomon;

- en oktobro komenciĝis nova sezono de prelegoj en nia klubejo. Lernantino Tena Kuzmanović prezentis Infanan kongreseton sur Pohorje (Slovenio). Spomenka Štimec parolis pri Jokohamo kaj Japanio. Judita Rey Hudeček retrospektive parolis pri fama IKS (Internacia Kultura

Servo) memore al ĝia 35-jariĝo. Rememoru ni ankoraŭfoje: ĝi estis fondita la 1-an de septembro 1972 kaj longtempe estis emblemo de kroata Esperanto-movado. Multaj nunaj eminentaj kroataj kaj mondkonataj esperantistoj hardiĝis tie, multaj kulturaj manifestacioj ekestis tie, kaj ĉiuj el ni nostalgie memoras tiun tempon de nia juneco kaj aktiveco. Mirjana Žeželj prezentis sian vojaĝon tra Portugalio.

- novembre niaj membroj estis la plej multnombra delegacio en Rijeka, kie niaj amikoj el Rijeka solene festis centjariĝon de unua Esperanto-organizo en Rijeka kaj Kroatio kaj kie niaj membroj Vida Jerman kaj Neven Mrzlečki multe kontribuis al la kultura programo. Decembre nia membro Radenko Milošević iniciatis fondon de nova Esperanto-unuiĝo en Kroatio. Ĝia nomo estas Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (mallonge: UZE);

- kaj nun aparte grava novaĵo: nia membrino Lucija Borčić finpretigis la manuskriptojn de du Esperantaj vortaroj por kroatlingvanoj: Granda Esperanta-Kroata Vortaro kaj Granda Kroata-Esperanta Vortaro kaj nia membro Damir Mikuličić tuj ofertis presi ilin ĉe sia eldonentrepreno;

- ni notu ankaŭ aktivecojn de niaj membroj kiuj estas nur komencitaj kaj la finon ni atendas en la jaro 2008. Nome, Spomenka Štimec kaj Vera Roknić preparas grandegan eŭropan tradukan projekton ĉe Plenumagentejo por kulturo, aŭdio kaj video en Bruselo; Radenko Milošević estis akceptita en Ŝtatprezidenta Oficejo por interkonsenti pri aŭspicio de la ŝtatprezidento por solena festado de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio kaj D-ro Velimir Piškorec komencis organizi simpozion "Esperanto kaj kroata kultura identeco" ĉe la zagreba Filozofia fakultato. Nia societo kandidatigis nian tegmantan landan organizaĵon KEL (Kroata Esperanto-Ligo) memore al la centjariĝo de Esperanto en Kroatio por Premio de Urbo Zagrebo en la jaro 2008. Substreku ni ankaŭ



kontribuon de niaj membroj kiuj pasintjare estis plej aktivaj en societaj aktivecoj kaj sen kiuj nia societo malfacile ekzistus. Temas do pri: Bojana Đuričić, kiu tre konsciencie zorgis pri membrokotizoj; Boris Čović, kiu estis preta prelegi kiam ajn bezonate kaj ankaŭ zorgis pri la societa kaso, ĉar oficiala kasisto ne plenumis sian taskon kaj Spomenka Štimec, ĉiam je dispono por fari laborojn kiujn aliaj ne volas aŭ ne povas fari. Niaj membroj ankaŭ finance multe helpis repagi krediton por nia estonta ejo en Vodnikova strato; finance helpis multajn ankaŭ alimaniere. Sed, miaopinie, ni aparte bezonas tiusence menciĝi niajn membrojn: Mira Matanović-Manner, Zlata Nanić kaj Damir Mikuličić.

Kaj nun, jen la laborplano por la jaro 2008. Ĝin mi komentus

jene:

- denove ni proponas prelegojn kaj konversaciajn vesperojn ĉiumerkrede kaj Esperantlingvajn kursojn laŭ intereso de la membraro;
- helpi KEL dum la centjariĝo de Esperanto en Kroatio;
- kunlabori kun nevidantaj esperantistoj dum ili organizas mondan Esperanto-kongreson por nevidantaj esperantistoj en Premantura (Istrio) inter la 11-a kaj 19-a de julio.

- organizi la 19-an de aprilo 2008 starigon de ekspozicio pri Esperanto laŭ la iniciato de nia nova membrino Gordana Kovač-Bluha. La ekspozicion oni malfermos la 22-an de aprilo 2008 kaj ĝi troviĝos en montrofenestro de "Volksbank" ĝis la 18-a de majo 2008.

- partopreni diversajn formojn de Esperanto-movado

landa, regiona, eŭropa kaj monda (kongresoj, festoj, konkursoj, renkontiĝoj, simpozioj, teatraj programoj, ktp.).

Financan raporton por la jaro 2007 preparis Boris Čović. Ĉar temis pri tre modestaj enspezoj (praktike nur de membrokotizo), ĝi provokis tre interesan diskuton en kiu ĉiuj (kaj membraro kaj gastoj) provis konsili kiel plibonigi financan staton tra oferto de projektoj al urbaj instancoj. Aliflanke, ĉiuj laŭdadis la enviindan aktivecon prezentitan tra la jarraporto kaj miris kiel eblas realigi ĉion tion kun tiel modestaj monrimedoj.

Post akcepto de ĉiuj prezentitaj dokumentoj, la membraro decidis post mallonga diskuto, ke Esperanto-societo "Bude Borjan" fariĝu kolektiva membro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE).

## AKTIVECOJ DE KROATA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

*Zlatko Hinšt*

La 18-an de marto 2008 okazis regula jarkunveno de Kroata Fervoja Esperanto-Asocio en la societejo (Placo de reĝo Tomislav 11). Ĉe la komenco de la jarkunveno estis elektita laborprezidantaro kiun gvidis la prezidantino de KFEA s-rino Mária Brletić. Unue, ni aŭskultis raporton de sekretariino s-rino Marta Dokić pri laboro de KFEA en la jaro 2007. Precipe estis akcentita partopreno de niaj membroj en la 59-a IFEF-kongreso en Parizo. Dum la jaro enkadre de regulaj kunvenoj la anoj preparadis unuopajn punktojn de programo (raportoj el fervojista kongreso kaj aliaj Esperantaj aranĝoj, inkluzive urbojn kaj landojn de koncernaj eventoj, tradicie reprezentata fervoja temo ktp). Sekvis kasista raporto kaj klarigo pri financa stato en la pasinta jaro kun ririgardo al estonta periodo. Krom tio oni raportis pri stato de societa biblioteko kaj pri turisma (ekskursa) agado. Estis aprobata laborplano kaj financa plano por la jaro 2008. Pri sia laboro kiel

komitatano (delegito) de KFEA en Internacia Fervoja Esperanto-Federacio, raportis vicprezidanto s-ro Zlatko Hinšt. Pasintjara sponsoro de KFEA Kroataj fervojoj ne financis ĝian agadon. Restas nur la ĝisnuna kontrakto kun la fervoja administracio pri uzado de ejoj en la aktuala adreso. Kiel gasto ĉeestis s-rino Spomenka Štimec, sekretariino de KEL kiu parolis pri festo de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio prezentinte laborprogramon efektivigotan dum la jaro.

En aprilo aperis labormaterialo de Regularo pri donacoj kaj sponsoreco de Kroataj fervojoj. Laŭ ĝiaj punktoj finacado de t.n. kultur-artaj kaj sportaj societoj ne okazos laŭ principo de aŭtomatismo kaj la kriterioj estas ligitaj ekzemple al nombro de membroj, specoj de aktivecoj ktp. La libertempaj fervojistaj societoj devas proponi kaj klarigi siajn programojn kaj projektojn kaj pri tio esti pozitive pritaksitaj kaj valorigitaj koncerne la financajn rimedojn. Ekestas nova

periodo en agado de KFEA kiam estas necese pli detale prezenti sian programon kaj eventuale fari projekton (interalie, ekzistas ŝanco por akcenti terminologian laboron en kadro de fervojista tegmenta organizo IFEF, precipe en kondiĉoj kiam Kroataj fervojoj preparas fakan laboron al kroata traduko de Fervoja Terminaro de Internacia Fervoja Unio). Eventuale, por partopreni la fervojistajn kongresojn ni povas proponi rekompencon flanke de nia sponsoro.

La redakcio de "Zagreba Esperantisto" instigis min skribi ankaŭ pri la societa biblioteko. KFEA havas bibliotekon kun kelkcent libraj kaj aliaj eldonaĵoj, precipe fakajn vortarojn, librojn kaj kongreslibrojn de IFEF kongresoj. Grava parto de la biblioteko estas konservitaj numeroj de iamaj bultenoj "La Fervojo" kaj "Jugoslavia fervojisto". Kelkaj eldonaĵoj reprezentas laboron de nia plej elstara membro – s-ro Josip Zupanić. Pri la biblioteko zorgas bibliotekistino s-rino Anka Špehar-Santolić.

# PRI LA IFEF-KONGRESO EN POZNANO

 Zlatko Hinšt

De la 17-a ĝis la 24-a de majo 2008 okazis la 60-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio en pola urbo Poznano. Ĝi estas ĉefa (administrada) centro de regiono-vojevodio Wielkopolska (Granda Pollando), sed Poznano en pli vasta senco estas unu el la plej gravaj ekonomiaj, kulturaj, edukaj kaj sciencaj polaj centroj. En Poznano ĉiun jaron okazas Internacia foiro, ĉiu kvina loĝanto de Poznano estas studento (ne nur relative, eĉ absolute laŭ la concerna nombro ĝi atingas rekordon en Pollando). Poznana universitato "Adam Mickiewicz" interalie inkludas Post-diplomajn studojn pri interlingvistiko kiu(j)n gvidas d-rino Ilona Koutny, konata esperantologo. En la urbo kaj en la regiono aktive agadas kelkaj Esperanto-organizoj, interalie Pola Fervojista Esperanto-Asocio – niaj dommastroj. Poznano

estas urbo kun riĉa historio kaj kulturaj heredaĵoj, kun multaj monumentoj, interesaj konstruaĵoj diversstilaj.

La Kongreson ĉeestis 169 partoprenantoj el 17 landoj. El Kroatio ĉeestis kvin membroj de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio kaj unu familiano. En kadro de la Kongreso okazis kelkaj kunvenoj. Unue la Komitata kunveno nepublika por komitatantoj kaj observantoj, reprezentantoj de landaj asocioj. Sekvis Plenkunsido publika kiel plenrajta formo de aprobo de raportoj pri laboro, kasista kaj aliaj raportoj el la jaro 2007 kaj aprobo de buĝeto por la jaro 2009. Unu kunveno rilatis al movadaj aferoj.

Regiona Fakoj de Polaj Fervojoj Linioj kiel entrepreno kaj Organiza komitato okazigis Teknikan konferencon sub la titolo

## 60-a Internacia Fervojista Esperanto - Kongreso




Pollando, Poznano  
17-24 majo 2008



"Modernigo de poznana fervoja nodo en jaroj 2006-2008". Post prelego de direktoro de la poznana regiona entrepreno en ejo de la

# NESUFIĈE DA GEJUNULOJ

 Dimitrije Janičić

La unua kongreso de serbiaj esperantistoj okazis inter la 1-a kaj la 4-a de majo 2008 en Niška Banja. La organizantoj, Serbia Esperanto-Ligo, Esperanto-Instituto kaj la urba Esperanto-societo el

Niš, organizis diversajn aktivecojn. La partoprenantoj de la kongreso konstatis, ke dum la lastaj jaroj la Esperanto-movado en Serbio bone funkciis, sed, bedaŭrinde, inter esperantistoj estas malmulte da

gejunuloj.

Dum la unua kongresa tago, post salutvortoj kaj prelego de Tereza Kapista pri la centjariĝo de UEA, estis prezentitaj du novaj libroj: Vortaro (Esperanto-serba kaj





direkcia kaj ĉefa inĝeniero-konstruisto de noda modernigo pri detalo de koncernaj grandaj investoj, la ĉeestantoj vizitis la novkonstruitan centron de stirado de fervoja trafiko en la ĉefa stacidomo de Poznano. Faka komisiono konsistas el Terminara Sekcio kaj Fake Aplika Sekcio. La Terminara Sekcio okazigis du kunvenojn sub gvidado de Jan Niemann kaj d-ro Heinz Hofmann. Dum programero "Fakaj prelegoj" okazis kvar prelegoj pri fervojoj. Unue prelegis d-ro Zlatko Hinšt pri temo "Trafika efikeco de fervojoj en Eŭropo kaj en la mondo" – per indikiloj surbaze de internacia fervoja statistiko de Internacia Fervoja Unio (UIC). Poste prelegis ĉeĥaj kolegoj pri elektronika ekipaĵo por informado de pasaĝeroj, sekvis franca preleganto pri kelkaj novaj teknikoj de konstruado kaj bontenado de relvojoj kaj finfine prezentigis preleganto pri dizela traktio en Danio.

Dum la solena malfermo krom enkondukaj salutparoladoj kaj raportoj de IFEF-aj estraranoj

kaj komitatanoj, la kongresanoj havis okazon ĝui la koncerton de koruso "Haslo" en la pola kaj Esperanto. La menciita koruso kantis ankaŭ dum Sankta Meso en preĝejo al La plej Sankta Savanto en Poznano, celebrita de pastro esperantisto Stanisław Stolz. Dum Nacia vespero oni aŭskultis polajn popoldancojn kaj kantojn kaj kanton de la ensemblo "Wielkopolska" kaj klasikmuzikadon de kvarteto de la orkestro "Simfionietta Polonia". Dum Kultura vespero kantis la koruso "Dysonans" kaj kanzonistino Zuzanna Kornicka kantis pole kaj Esperantlingve. La kongresanoj povus ĝui la dancojn, precipe de dancistoj, dum Internacia balo. La kongresanoj ĉeestis en kelkaj ekskursoj. La unua ekskurso estis per trajno kun vaporlokomotivo al Wolsztyn kie troviĝas malnova hejtejo nun funkcia kaj muzeo de vaporlokomotivoj. Tuttaga ekskurso enhavis viziton en Biskupin – fama arkelogia elfosaĵo kaj etnografie konstruita setlejo kiel prezento de frua pola historio,

Wenecja – muzeo de mallarĝtraka fervojo kun etŝpura trajno en funkcio por vizitantoj kaj Gniezno – la unua historia metropolo de Pollando kun katedralo – konata kiel loko de kronigado de imperiestroj. La dua duontaga ekskurso enhavis viziton al kastelo Kórnik, palaco Rogalin, inluzive al iliaj parkoj kaj privata muzeo kun kolektoj de naturaj, ĉasistaj trofeoj, restoj de monumentoj kaj bildoj el diversaj landoj de la mondo kaj ellaborita kopio de Kolumba navo "Santa Maria" kaj Keopsa miniatura piramido ellaborita de pola terglobtrotisto Arkady Fiedler kaj liaj filoj en Puszczykowo.

Antaŭ solena fermo prezentis sin la venonta IFEF kongreso en Triesto, kie okazos festo de centjara jubileo de internacia fervojista Esperanto-movado. Post regula programo de la kongreso, okazis postkongreso konsistinta el kelkaj pluaj vizitoj al interesaj polaj lokoj – historiaj urboj Toruń, Olsztyn kaj Malbork kaj Bjalistoko – la naskiĝurbo de L. L. Zamenhof.

## LEGU KAJ REKLAMU "ZAGREBAN ESPERANTISTON"

serba-Esperanto) de tri aŭtoroj (Adem Jakupović, Momčilo Očokoljić kaj Marko Petrović) kaj traduko de la lernolibro de Stano Marček "Esperanto – direkta metoda" en la serba (traduko de Tereza Kapista), nova numero de "Beograda Verda Stelo", informa kaj literatura revuo kiu, en modesta formo, jam la trian jaron aperas, kaj traduko de la romano de vojvodina hungarlingva verkisto Nandor Gion al Esperanto "Salvo al nigra bubalo" (traduko de Laslo Husar).

Dum la dua tago prelegis la institutanoj: Boriša Milićević pri historio de Esperanto-movado en Serbio, d-ro Miodrag Stojanović pri utiligo de Esperanto en scienco, Zlatoje Martinov pri originala Esperanto-literaturo, d-ro Pribislav Marinković pri tradukoj el la serba literaturo en Esperanton, magistro Radojica Petrović pri lernado de Esperanto rete, magistro Gvozden Sredić pri Esperanto-movado inter fervojistoj kaj Dimitrije Janičić pri Esperanto-gazetaro. Ĉiuj prelegoj aperis en aparta kongresa numero de "Beograda Verda Stelo". Vespere en Eŭropa domo, en urbocentro de Niš, estis malfermita ekspozicio pri Esperanto.

La tria tago estis rezervita por konatiĝo kun kultur-historiaj vidindaĵoj de la urbo, por ekskurso kaj komuna tagmanĝo en naturo.

La kongresanoj konkludis, ke temo de sekva kongreso okazonta post du jaroj povus esti "Edukado de instruistoj/antoj de Esperanto kaj aktivadoj por plijunigo de Esperanto-movado".

La unuan kongreson de serbiaj esperantistoj el Kroatio partoprenis Vukašin Dimitrijević el Split.

Mi salutas la intencon, ke Esperanto en Respubliko Serbio denove ekfloru kaj progresu kaj la kongreso estu ĝuste la unua ŝtupo en tio.

Montru, ke ni esperantistoj estas kiel birdo fenikso, kaj post diversaj malagrablaĵoj kaj nekredablaj eventoj, vi estos unu inter tiuj kiuj provos transponti ruinojn inter sudslavaj popoloj kaj esperantistoj - esperante per Esperanto.

Per Esperanto kaj pro Esperanto oni devus ripari la disŝiritajn rilatojn inter popoloj kaj esperantistoj kaj fari tion kion politikistoj jam provas celante komunan Eŭropan union.

*m-gro Radenko Milošević,*  
vicprezidanto de KEL

# KROATAJ RADIKOJ DE BRAZILAJ ESPERANTISTINOJ

*Gilberto Menegasso  
kaj Josip Pleadin*



*Neide kaj Maria Esmeralda*

Kroatoj apartenas al nacioj, kiuj en la pasintaj jarcentoj plej multe elmigradis. Oni taksas, ke inter la mezo de la 19-a kaj komenco de la 21-a jarcento, el Kroatio elmigris 1,3 milionoj da homoj. La unua ondo de elmigrintoj komenciĝis fine de la 19-a jarcento, kaj ĝi estis verŝajne la plej intensa, ĉar oni taksas, ke inter 1880 kaj 1914 elmigris ĉirkaŭ 500.000 homoj. La ĉefaj kaŭzoj estis ekonomiaj, sed ne malpli gravas ankaŭ politikaj reprezentoj kaj konstanta danĝero de okazonta milito. En la unua periodo, la ĉefaj direktoj de elmigrado gvidis al Usono, kiu bezonis malmultekostan laborforton. Kiam post la unua mondmilito Usono fermis eblecon por amasa enmigrado, la elmigrintoj direktiĝis al sudamerikaj landoj, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. En periodo inter la du mondmilitoj el tiama Jugoslavio elmigris preskaŭ 200.000 homoj, el kiu 53 procentoj estis kroatoj. Post la dua mondmilito (ĝis 1948), la landon forlasis ankoraŭ 250.000. En 1960-aj kaj 1980-aj jaroj okazis granda migrado de ĉirkaŭ 400.000 gastlaboristoj al landoj de okcidenta eŭropo, sed multaj el ili asimiliĝis kaj restis konstante vivi en aliaj landoj, ĉefe en Germanio, Aŭstrio ktp. La lasta perdo de la loĝantaro pro grandaj migradoj okazis en




*Marija Dolusic kaj Ferdinand Toma Crnkovic*

tempo de la Patrolanda milito (ekde 1991). Kune kun la militaj perdoj, la elmigrado en la pasintaj 150 jaroj estis esence grava faktoro kiu plej multe malekvilibrigis la demografian evoluon de kroata nacio, ties politikan kaj ekonomian evoluon.

Antaŭ kelkaj monatoj al nia redakcio venis letero de brazilaj lernantinoj de Esperanto, kiuj menciis siajn kroatajn radikojn. El tiu letero evoluis rakonto pri ili kaj pri kroataj elmigrintoj. En Brazilo laŭ neprecizaj statistikoj vivas nuntempe ĉirkaŭ 7.000 kroatdevenaj civitanoj, kio estas nur malgranda parto de kroata diasporo.

Neide Crnkovic (origine: Crnković) kaj Maria Esmeralda Bellobraydic (origine: Belobrajdić) estas kuzinoj vivantaj en la brazila urbo São Carlos (ŝtato São Paulo). Neide naskiĝis en 1941 kaj Maria Esmeralda en 1936.




*Catharina Mance kaj Antun Bellobraydic*



*João Bellobraydić kaj Maria Crnković*

Neide, kiu estas fraŭlino, rakontis al ni: "Dum multaj jaroj mi estis instruistino en elementa lernejo. Miaj patraj geavoj estis Toma Crnković kaj Antonija Doluŝić. Ili geedziĝis en februaro 1872 kaj en novembro 1896 ili translokiĝis al Brazilo. De tiu geedzeco naskiĝis Marija (1874), Ferdinand Toma (1876), Veronika (1880), Barbra (1881), Mirko (1883), Vid (1886), Gavro (1888), Ivan (1889), Ivka (1891) kaj Antun (1893). Miaj patrinaj geavoj estis Antun Bellobraydić kaj Catharina Mance. El tiu geedzeco naskiĝis João, Anna, José kaj Catharina. Mia patro, Antun Crnković naskiĝis en Kupjak, en la regiono de Gorski Kotar, en la jaro 1893, kaj mortis en Brazilo en 1986. Mia patrino Catharina Bellobraydić naskiĝis en 1903 en Brazilo kaj mortis en 1988. El tiu geedzeco naskiĝis João, Antonio, Anna, Milco, José, Ignez, Rubens kaj mi."

Maria Esmeralda rakontis pri siaj geavoj jene: "Mi estas dommastrino. Miaj patraj geavoj nomiĝis Antun Bellobraydić kaj Catharina Mance, kies infanoj nomiĝis João, Anna, José kaj Catharina. El la patrino flanko la geavoj nomiĝis Ferdinand Toma Crnković kaj Marija Doluŝić. La avo Ferdinand Toma naskiĝis en 1876, kaj kune kun la edzino Marija venis al Brazilo en novembro 1897. Iliaj infanoj estis José, Maria kaj Angelina. Mi estas filino de João Bellobraydić, kiu naskiĝis en 1893 en urbo Vukovar, kaj mia patrino naskita en 1901 estis Maria Crnković. Krom mi, miaj gepatroj havis aliajn 8 infanojn: Antonio, Ivo,



*Antun Crnković kaj Catharina Bellobraydić*



*Antonija Dolusic*

Fernandes Thomaz, Isvany Ivonne, José Carlos, Olga Neusa, Pedro kaj Carlos Hélio."

Laŭ tiuj faktoj, la brazilaj esperantistinoj Neide kaj Maria Esmeralda estas nepinoj de kroataj elmigrintoj el la unua migracia ondo. Bedaŭrinde, hodiaŭ ili ne plu parolas kroate, sed ili lernas la lingvon de siaj geavoj pere de Esperanto.

Homaj sortoj estas diversaj. Portitaj de migraciaj ventoj homoj foriras al alia mondoparto, adoptas alian lingvon kaj kulturon. Sed, laŭ kroata popoldirajo "sango ne estas akvo", ankaŭ la brazilaj esperantistinoj eksentis vokon de lando de siaj geavoj. Paroli tute nekonatan lingvon de siaj geavoj, kiu tra la vivado en alia lando fariĝis al ili fremda, estas ilia revo. Eble eĉ viziti la pitoreskan lokon Kupjak aŭ la milite detruitan Vukovar estus emocia evento en iliaj vivoj. Ĉiukaze, pensante pri siaj kroataj radikoj, ili pli proksimas al siaj geavoj, kiujn la malfacilaj politikaj kaj ekonomiaj perturboj portis al Brazilo.


## RENKONTE AL ...



94-a Universala Kongreso de Esperanto  
25.07-1.08.2009  
Bjalistoko, Pollando

... spektu E-filmojn ĉe  
[www.tvbialystok.pl](http://www.tvbialystok.pl)  
kaj  
[www.itvc.pl](http://www.itvc.pl)

# LUDOVIKO ZAMENHOF RAKONTAS PRI SIA VOJAĜO PER LA TRAJNO "ZAMENHOF"

 **Andrzej Remza**

Proksimiĝis la 1-a de junio - la tago en kiu mi devis travivi la plej gravan aventuron de mia vivo, ekkoni tute nekonitajn homojn kaj ĝis nun nekonatan sferon de esperantistoj. La lasta nokto antaŭ la forveturo pasis tre rapide. Mi enlitiĝis kiel tute ordinara, "sennoma" ŝtatifcisto, kaj mi ellitiĝis kiel la tria - post Johano Paŭlo la 2-a kaj Frideriko Ŝopeno - plej konata polo, Ludoviko Zamenhof. La tempo retropaŝis pli ol cent jarojn, ĝis la komenco de la 20-a jarcento. Mi vestis min per frako, ĉapelo kaj okulvitroj, mi alpinglis la Ordenon de Honora Legio; ankaŭ mi ne forgesis vojaĝsakon kaj bastonon. Ankoraŭ mi laste frizis mian lipharon kaj mi pretis por vojaĝi.

## **Bjalistoko - la stacidomo** ĉ. 5h40.

Kun ia malkuraĝo mi aperis en loko, en kiu devis komenciĝi la plej bela vojaĝo de mia vivo. Senton de necerteco rapide nuligis esperantistino Ela Karczewska, kiu - kiel la unua, ankoraŭ neoficiale - salutis min per sia nedisigebla rideto kaj kuraĝigaj, agrablaj vortoj. Tuj poste alvenis ankaŭ la edzino, Klara, aŭ Nina en reala vivo. Ja ŝi poste rakontis al mi plurajn, eksterordinarajn aferojn pri Esperanto. Ĉe la stacidomo atendis nin vera akceptokomitato. Tre pompe kaj noble salutis nin ĉeestantaj esperantistoj. Precipa honoro estis por ni ĉeesto de la urbestro, Tadeusz Truskolaski. Sinjoro urbestro salutis ĉiujn alvenintajn gastojn kaj solene ŝanĝis tableton de la trajno, kiu renomiĝis de "Narew" al "Zamenhof".

Proksimiĝis tempo de la forveturo, do la horo sesa kaj kvin minutoj. Mi kaj Klara elstaris feliĉaj tra trajna fenestro. Mi eĉ per-

la plej aŭdaca espero ne suspektis, ke ni estos adiaŭataj tiel elkore kaj samtempe tiel noble. Mi, modesta kuracisto revanta pri pliboniĝo de la mondo kaj mia edzino.

Alvenis la horo. Sinjoro urbestro blovante en veran fervojan fajfilon permesis foriron de la trajno. Tiel ni ekveturis por trovi nian eksterordinaran aventuron.

## **Varsovio - la stacidomo** ĉ. 8h30

En Varsovio, same elkore kiel en Bjalistoko, salutis nin granda grupo da esperantistoj. Estis tiel agrable aŭskulti afablajn dirojn, poemojn kaj kantojn. Mia koro ĝojis kiam mi vidis afablecon de miaj amikoj samideanoj. Tutcerte memoro pri mi kaj pri miaj ideoj estis kaj vivis en tiuj homoj. La halto ne daŭris longe kaj kun granda bedaŭro ni denove ekiris.

## **Piotrków Trybunalski - la stacidomo, ĉ. 10h30**

Ankaŭ ĉi tie, kiel ni esperis, atendis nin sekva grupo de esperantistoj, inter kiuj estis ankaŭ infanoj. Kompreneble okazis koreca saluto, donacoj kaj komuna ĝojo por la renkontiĝo. Bedaŭrinde oni ne permesis al ni tro longe reciproke ĝoji ĉar la trajno tuj ekiris la pluan vojon.

## **Sosnowiec - la stacidomo** ĉ. 12h50

La trajno alvenis al Sosnowiec kun eta prokrasto, do ja ankaŭ la gastoj kun plia senpacienco atendis nian alvenon. Ĉi tie certigis miaj observoj laŭ kiuj sendepende de mondloko esperantistoj ĉie estas same amikemaj kaj disfloras inter ili volo de amikeco kaj kunlaboro. Jam tradicie oni salutis nin kiel la plej bonajn amikojn kaj faris donacojn. De Sosnowiec ĝis la fina stacio restis jam nur unu horo kaj duono.

## **Bielsko-Biała - la stacidomo** ĉ. 14h40

Finfine ni alvenis. Kia eksterordinara saluto! Granda grupo da esperantistoj salutis nin kun muziko de la loka, montara popola muzikgrupo. Pri forto kaj efikeco de esperantistoj asertu la fakto de ŝanĝo de nia fina trako. Tio estis ja nekredbla, la trajnon oni transmetis al la trako pli proksima de la stacidomo, por ke Ludoviko kaj Klara povu rekte foriri al salutantaj gastoj. Mi verŝajne ne devas menciigi korecon kaj amikecon kiujn oni donis al ni.

Surloke ni renkontiĝis kun la loka grupo de esperantistoj kaj kun ili ni pasigis longajn horojn preparolante oficialajn aferojn. Malgraŭ tio, ke ĝi estis t.n. laborkunveno, ĝi okazis je amika kaj simpatia etoso. En Bielsko-Biała ni renkontis s-rinon direktorinon kaj infanojn de unu el bazlernejoj kaj ni instigis ilin al kunlaboro kaj lernado de Esperanto. Ne mankis kompreneble tempo por renkonti amikojn (ankaŭ esperantistojn). Du tagoj de nia restado en tiu belega urbo forpasis tre rapide, kvazaŭ nur unu horo. Venis la tempo adiaŭi kaj fini tiun bonegan aventuron.

Hodiaŭ mi denove vekigis kiel ŝtatifcisto, tamen mi ne plu estas la sama, "sennoma" homo, kiu mi estis antaŭ tiu neforgesebla, fantazia vojaĝo. Nun mi scias, ke en modernaj, kelkfoje tre malfacilaj tempoj, ne mankas homoj, al kiuj amo, amikeco kaj grandega spiritsereneco estas la plej gravaj valoroj. Homoj, kiuj kapablas ĉion oferi al aliaj homoj kaj ne timas malfermiĝi al aliaj - jen estas esperantistoj.

*Esperantigis: Pŝemo Wierzbowski*

**Ludoviko kaj Klara,  
respektive  
Andreo Remza kaj  
Nina Pietuchowska** ➔



 Emil Hrvatin

 "Foto Kurti", Rijeka

# Pokalo Kostrena 2008

## Kroata Konkurso pri Scio de Esperanto por Lernantoj el Elementaj Lernejoj

La konkurso okazis de la 16a ĝis la 18a de majo 2008 en skolta restadejo "Esperanto Domo" en Kostrena. Organizis ĝin Kroata Esperanto-Ligo (KEL) kaj Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) kunlabore kun Esperanto-Societo Rijeka, gastiganto de la projekto.

Post alveno, vendredon la 16an, la gelernantoj eluzis tempon por bani sin en la maro. Vespere ĉiuj partoprenantoj ricevis saketojn kun donacoj de la gastiganto. Pri interkona vespero zorgis tri membroj de Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA), nia tradicia kunlaboranto en la projekto. La konkurso mem okazis sabatan matene. Dum la konkursa komisiono trarigardis la respondojn, la gelernantoj distriĝis je duontaga ekskurso en Crikvenica. En la tiea haveneto atendis nin ŝipo kun fenestroj en sia fundo por spekti la marundon. Reveninte al la urbeto, ni vizitis akvariaron kun abundo da mirindaj marestaĵoj. Fine de la ekskurso restis tempo por amuzo kaj banado. Amuzegan kvizon okazigis KEJA vespere kaj disdonis premiojn al gajnintoj.

Dimanĉon matene, tradicie, la komisiono proklamis venkintojn de la konkurso:

### En kategorio "A" (komenca):

1. Dorotea Martinec (Elementa Lernejo "Mladost", Zagreb)
2. Petra Sarić (Elementa Lernejo "Mladost", Zagreb)
3. Danijel Hrvatin (Elementa Lernejo "A. Mohorovičić", Matulji)



### En Kategorio "B" (progresinta):

1. Tena Kuzmanović (Elementa Lernejo "Retkovec", Zagreb)
2. Nikolina Gegić (Elementa Lernejo "Retkovec", Zagreb)
3. La tria premio ne estas atribuita

### Pokalon Kostrena 2008 por la plej bona lernejo

Elementa lernejo "Retkovec" Zagreb

Rangitaj lernantoj kaj la plej sukcesa lernejo estas premiitaj per pokaloj kaj diplomoj.

Medalon por la plej juna konkursantoj ricevis: Danijel Hrvatin Elementa Lernejo "A. Mohorovičić", Matulji kaj Marija Gegić el Elementa Lernejo "Retkovec" Zagreb

La gastiganto disdonis dankdiplomojn al ĉiuj partoprenantoj. Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) donacis al ĉiu lernanto ekzempleron de porinfana libro "La Karamadaro de Petro Nodeto" (originale: Družba Pere Kvržice) de Mato Lovrak, eldonita de "Grafokom" Đurđevac. UPE ankaŭ premiis du plej sukcesajn lernantojn en ambaŭ kategorioj per partopreno en Internacia Infana Kongreseto 2008 en Oostvoorne, Nederlando dank' al financa subteno de Ministerio pri Klerigado, Kulturo kaj Sporto.

La projekton finance subtenis Departemento pri Klerigado kaj Lernejoj de Urbo Rijeka.



# SAT-amikaro kongresis en Antony

 *Etel Zavadlav*

La 63-a kongreso de SAT-amikaro okazis inter la 22-a kaj 25-a de marto ĉi-jare, en la sama loko kie okazis la pasintjara SAT-kongreso: en Antony apud Parizo. Aliĝis 83 partoprenantoj, plejmulto da aliĝintoj ankaŭ venis.

Mi havis okazon konatiĝi persone kun la fama bildstriisto Serge Sire, kaj kun lia fama tandemulo, la Esperanta kantisto Ĵak Lepuil.

Por la unua fojo mi partoprenis la kongreson de SAT-amikaro. La impresoj estas ĝenerale pozitivaj, kaj mi volas instigi esperantistojn, precipe tiujn kiuj ne naskiĝis tro frue, aliĝi al SAT kaj al SAT-amikaro, ĉar ĉi-tie mankas iom da freŝa juna sango.

La unua tago, sabato, estis ĉefe dediĉita al ekzamenoj, kaj mi sukcesis, en grupo de 6 ekzamenitoj, facile trapasi la mezan ekzamenon de estiminda institucio Franca lingva instituto. Do, kompreneble, atestilojn oni ne bezonas por sukcesa komunikado (ĉu eĉ lingvon?), tamen agrablas svingi per iu pruvpapero, almenaŭ al tiuj kiuj dubas pri mia lingvokapablo. Nu, oni daŭre dubu - skeptikismo estas plej sana pensmaniero.

Sabate posttagmeze sekvis du prelegoj (pri Esperanto-muziko kaj pri retpaĝa prizorgado). Vespere koncertumis "La kuloj" kaj "La Pafklik". Kuloj ludis bone kaj inetrese, precipe balkandevenajn kantojn. Ili povus tute libere ŝanĝi la nomon al "Abeloj", aŭ "Vespoj" - kuloj estas vere pli molestaj ol ilia muzikado.

Pri "La Pafklik" mi prefere ŝparos la vortojn. Fakte, mi fieras ke tiu kvazaŭmuzikumado (rap?! ) ne plaĉas al mi. Ili krias, saltas, kakofonias ... Paf-fik, ne valora, sub ĉiuj kriterioj.

Dimanche okazis la oficiala malfermo kaj la unua laborkunsido. Posttagmeze André Cherpillod prelegis pri kultura valoro de Esperanto. Vespere kantis kaj gitarludis Ĵak Lepuil.

Lundo komenciĝis per laŭkutimaj laborkunsidoj. Posttagmeze oni prelegis, aŭ pli precize, diskutis, pri privatigo de lernejoj, kio montriĝis vasta kaj interesa temo, aparte por t.n. anarkiistoj, aŭ tiuj kiuj iam ie ion legis pri anarkiismo kaj restis fascinitaj per belsoneco de tiu esprimo. Iu virino starigis demandon ege tiklan: ĉu neniu inter anarkiistoj pretas mem preni la povon de edukado el manoj de ŝtato, kaj kiel oni opinias malaperigi la ŝtaton kaj daŭre havi ŝtatajn lernejojn. Interese! Karaj nunaj kaj estontaj anarkiistoj, vi sciu ke ne sufiĉas trovi belecon en iu vorto por atribui al si tiun etiketon: anarkiisto - kiom digne tio sonas! Ni tuj nuligu ĉiujn ŝtatojn kaj fariĝu feliĉaj analfabetoj vaste ridetantaj, ni evoluu al direkto de edenĝardeno ...

Sekvis prelego de diligenta kamarado Vinko Markov pri elmigrado kaj defendo de rajtoj de personoj sen legitimitoj, ebla rolo de Esperantomovado en tiu medio.

Lunde vespere koncertis simpatia paro kun ege sprita nomo "Duoble unu". Ili sukcesis iomete plivarmigi la etoson, sed ne tro. Tamen, por debuta koncerto, pli ol kontentige.

Mardon ni pasigis en Vinceno, en tuttaga ekskurso. Krome, ni vizitis florgaredojn (plej kuriozaj estas la forcejoj kun bonsajaj arbetoj), kaj muzeon de migrado (iam nomata "Muzeo de koloniaj artoj"). Survoje estis organizita tagmanĝo en "Quik" restoracio, sed mi feliĉe travivis, kun nur kelkaj aknoj sur la dorso. Ĉio ja havas sian prezon, ĉu ne? Rekompenco venis baldaŭ - mi ĝuis iom da familia etoso en la sidejo de SAT-amikaro, trinkante teon kun simpatiaj personoj, ne ĉiuj en maljuna vivfazo.

Merkrede mi devis disiĝi de la franca metopolo, kun koro ploranta. Ĝis baldaŭ, kara sinjoro Parizo, kaj fartu bone, atendu min fidele.....!

## Konferenco de komunistoj (IKEK)

antaŭ la UK en Roterdamo, 16-a -19-a de julio 2008  
en lokalo de "Rode morgen", Cronjestraat 41

***Fantomo hantas tra la mondo*** - nia nova slogano

Konferenckotizo: 20 eŭroj

***Bv. aliĝi ĉe:***

Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH-4702 Oensingen  
dieter.rooke @vtxmail.ch





Mi skribas reage al via propono (en la novembro n-ro de "Zagreba Esperantisto" 2007) pri ebla nova nomo por via revuo, ĉar certe mi estas unu el tiuj kiuj opinias, ke "Zagreba Esperantisto" estas nomo "tro loka" por revuo kun enhavo tia. Ĝia enhavo estas certe pli tut-kroata (kvankam ne nur) ol nur zagreba, tamen ebla pli oportuna nova nomo kia "Kroata Esperantisto" laŭ miaj scioj tute ne eblas ĉar ĝi jam ekzistas (ĝi estas la organo de KEU, ĉu ne?), kio memorigas min ke en Kroatio "kunvivas" tri tut-kroataj Esperanto-revuo! (kalkulante pri "Tempo" la organo de KEL) kaj siavice du tut-naciaj Esperanto-Asocioj (almenaŭ laŭnome). Vere, laŭ mia opinio, nekredbla situacio por lando malgranda (Obeliks [la gaŭla heroo] dirus: "...tiuj ĉi kroatoj frenezumas"). Ĉu vere havas sencen, ke krom miaj sciigoj de nun ekzistantaj tut-naciaj Esperanto-organizaĵoj – kiuj espereble iam estonte uniĝos – aperu alia movada revuo adresita al sama (certe malabunda) publiko, kvankam ĝi estu tiel interesa enhave kaj grafike kiel "Zagreba Esperantisto"? Kontraŭe, iom pli da senco havus eldono de iu Esperantlingva socikultura revuo pri la regiono (inkludante priesperantajn artikolojn, sed ne movadaĵojn, aŭ almenaŭ ne multajn). Pri kiu regiono? Bone, kial ne pri Balkanujo, tiu regiono de sud-orienta Eŭropo, tiel nekonata ankoraŭ de aliaj eŭropanoj kaj kiu post ne multe plenrajte eniros Eŭropan Union? Al tiu regiono apartenas (se ne geografie, certe historie) ĉiuj eks-Jugoslaviaj respublikoj, Albanujo, Grekujo, Bulgarujo, la eŭropa parto de Turkujo kaj Rumanujo. Certe en tiel ampleksa teritorio rezultos pli facile trovi kunlaborantojn por la revuo. Kaj pri la nomo, kial ne "Balkana (gazeto)" aŭ "Balkana (revuo)"? Vidu pri la temo la du kunsenditajn JPEG-dosierojn. Amikan saluton el la norda Hispanujo.

Jose-Ignacio Vélez Ortiz



Mi volas danki pro la abonigo de via revuo al mi kiu okazis danke al mia amiko Koffi. Mi ĵus ricevis la duan numeron kiu tre plaĉas al mi, aparte la artikolo de sinojorino Lappenna kaj la rakonto pri bicikla vojaĝo de la svisa samideano. Ekzistas ankaŭ aliaj interesaj temoj. Mi esperas, ke via revuo vivos longe kaj ne mortos kiel aliaj Esperanto-gazetoj kaj revuoj kiuj, bedaŭrinde, ĉesis aperi.

Princo Henriko Oguinye (Niĝerio)

Por VVIA (Belgio, www.vvia.be) kaj E-FAITH (la eŭropa kupola organizo, www.e-faith.org) mi serĉas kontaktojn, precipe en baltaj landoj, kun personoj kiuj interesiĝas kaj/aŭ kapablas raporti pri industria arĥeologio (tio estas la konservado kaj reuzo de industriaj maŝinoj kaj konstruaĵoj ne plu uzataj).

Roland Rotsaert, rotsaert@esperanto.be

Koran dankon pro la du numeroj de "Zagreba Esperantisto" senditaj al nia Asocio. Ege interesa kaj bela revuo! Kun granda intereso mi tralegis rememorojn de s-ino Birthe Lapenna pri tre estimata s-ro Ivo Lapenna. Ankaŭ interesa estas priskribo pri "La vojaĝo de la ruĝa biciklo". Mi volus demandi, ĉu ni restas tiom feliĉaj, ke ni ricevados la revuon senpage?

Firdaus Sukurov (prezidanto de la Asocio de esperantistoj de Taĝikio)



La supra foto montras polajn esperantistojn, kiuj kun intereso legas nian gazeton survoje al Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj Esperantistoj en Litovio. La gazeton tenas Halina Komar, redaktorino de "Pola Esperantisto".

Maldekstre: Nia gazeto estas konata ankaŭ en Taĝikio. Jen nia taĝika legantino kun la plej freŝa numero de "Zagreba Esperantisto".

# ESPERANTO KAJ FILATELO

 Radenko Milošević



Okaze de la 15-jara jubileo post la fondiĝo de la Kroata societo de olimpi-sporta filatelo inter la 25-a de majo kaj 1-a de junio estis organizita ekspozicio en la muzeo "Mimara". Parton de la ekspozicio konsistigis ankaŭ la Unua filatela ekspozicio de Esperantaj poŝtmarkoj kaj memorigaĵoj.

Inter aliaj ekspoziciitaj poŝtmarkoj pri sporto prof. Nikola Turk (meze sur la foto) ekspoziciis Esperantaĵojn en kvin vitrinoj en ĉiu kun 12 folioj. Grandega laboro! En la ekspozicia katalogo sub la n-ro 34 kiel temo estis menciita Esperanto, kiu situis ĉe la enirejo, en la vitrinoj 14 ĝis 18. Al la profesoro Turk helpis prepari la Esperantan parton de la ekspozicio sinjoroj Josip Pleadin kaj Radenko Milošević. Parto de la ekspoziciitaj folioj prezentis materialojn de s-ino Spomenka Štimec kaj speciale multon helpis f-ino Ana Gašpar el la Zagreba ekonomia ĉambro. Krom Esperanto-poŝtmarkoj estis ekspoziciitaj kovertoj kaj poŝtkartoj de kroataj Esperanto-kongresoj kaj jubileoj. Inter la ekspozitaĵoj troviĝis eĉ tiuj, senditaj al Marinko Gjiivoje antaŭ kvindekaj jaroj. Specialan parton okupis titolpaĝoj de Esperantan tradukitaj libroj kun poŝtmarkoj eldonitaj de Kroata poŝto dediĉitaj al unuopaj kroataj granduloj kaj verkistoj, kies poemoj aŭ tekstoj estas presitaj en tiuj libroj.

La ekspozicion malfermis s-ro Ivan Librić (dekstre sur la foto), prezidanto de la Societo, kiu aparte menciis la Esperantan parton de la ekspozicio. Li klarigis, ke ankaŭ li estas iaspeca esperantisto, ĉar li uzis en siaj kontaktoj kun japanaj filatelistoj - Esperanton!



## PRESENTITA LA SEPA VOLUMO DE "OKLINGVA ENCIKLOPEDIA VORTARO"

En Leksikografia instituto en Zagrebo la 4-an de junio 2008 estis prezentita la sepa volumo de "Oklingva enciklopedia vortaro" kiu entenas 9779 kroatajn leksikajn unuojn kaj 264.000 fremdajn vortojn, inter kiuj ankaŭ latinajn. La sepa libro de la vortaro sisteme prezentas vortojn kiuj el la kroata lingvo estas tradukitaj al la rusa, angla, germana, franca, itala, hispana kaj latina lingvoj. La vortoj klarigas pratempan mitologion kaj modernan teknikon, medicinajn sciencojn kaj politikon, kun aplikoj kaj frazemoj.

La latinan parton redaktis **d-ro Jozo Marević**, kiu krom sia klasiklingva fakeco estas esperantisto, membro de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj kaj membro de la redakcio de "Zagreba Esperantisto".

Pri la leksikono parolis la ĉefdirektoro de la Instituto **prof. Tomislav Ladan**. Krom la ĉefdirektoro parolis ankaŭ nia membro s-ro Marević menciinte, ke la "Vortaro" estas "perlo de leksikografio" generale en la monda leksikografio. Li klarigis, ke oni enmetis la latinan lingvon inter aliajn sep vivantajn lingvojn pro la rolo kiun havis la latina lingvo ĝis la jaro 1847 kiam kroata Parlamento (Sabor) anstataŭis ĝin per la nacia kroata lingvo. Nome, ĝis tiam en la Parlamento de la Reĝlando Slavonio, Kroatio kaj Dalmatio oni parolis latinlingve por kontraŭstari al premprovoj de germana kaj hungara lingvoj.

Oni akcentis, ke la projekto de tiu ĉi vortaro komenciĝis pro la graveco de la "Deklaracio pri la nomo kaj pozicio de la kroata literatura lingvo" el la jaro 1967. La Deklaracion konceptis grupo da bravaj kaj inteligentaj homoj, kiuj postulis rajton por uzi la propran lingvon.